

ANNOUNCEMENTS.

As has been previously announced this number does not contain some of our usual departments, and news items are entirely omitted. The next number will be the great **Special Congress Number**, telling in clear, concise manner, backed up not by theory, but by actual experiences of Americans in Europe and at the Congress, just what Esperanto amounts to for travelling, and just what has occurred at the Seventh International Esperanto Congress. That this will have a larger attendance than any previous congress there is no question, and there is equally no doubt that the descriptions and photographs in the next number of *Amerika Esperantisto* will be such that you will wish a large number to give your acquaintances. If your order for ten, twenty or fifty has

not yet been sent in, fill out the blank to be found among the advertisements in the back, and **MAIL IT TO US TODAY**. Remember that when the presses start to turn this out, we shall tell the printer just how many we want, and it will be too late the next day to add to this amount. **ORDER NOW**.

We are doing our end of this matter. Our editor-in-chief is in attendance at the Congress, photographs of everything interesting are being secured, and while you are reading this, the members of the *Nordamerika Karavano* are busily engaged writing out for you some of the most interesting of their experiences. See that every one you know has a copy of the **Special Congress Number**.

FOR THE BEGINNER

Just when is the adverbial participle to be used?

The participle is a derivative from the verb, therefore has certain verbal characteristics, whether we make of it a noun, adjective or adverb (by the endings *-anto*, *anta*, or *ante*). The noun from it gives no difficulty. The adjective and adverb need more care, and need to be distinguished from each other. Used as an adjective, the participle describes in some way the noun or pronoun modified. Used as an adverb, it modifies a verb, phrase, or clause, just as any other adverb would. It retains enough of the verb-character to need a subject, therefore its subject is the same as the subject of the verb in the sentence. It can never modify the object of a verb or complement of a preposi-

tion. This ensures clearness and makes its use easy.

Note the difference between the adverbial and adjectival character in the following examples:

La knabo forkurinta sin kasis, the boy who had run away hid himself.

La knabo, forkurinte, sin kasis, the boy, having run away, hid himself (i. e., the boy hid himself after or because he had run away).

Mi trovis la forkurintan knabon, I found the boy who had run away.

Mi trovis lin post kiam li forkuris, I found him after he had run away.

Mi kasis lin, ĉar li forkuris, I hid him because he had run away.

Liaj gepatroj, ĉagrenite, lin punis. His parents, vexed (because they were vexed), punished him.

Mi sendis leteron petantan ke vi helpu,
I sent a letter asking that you help.
Mi sendis leteron, esperante ke vi
helpos, I sent a letter, hoping (be-
cause I hoped) that you would help.

Mi sendis leteron al vi, ĉar vi komprenis
pri la afero, I sent a letter to you,
because you understood about the
affair.

LA MALGRANDA SAFISTINO

ANTAŬ LONGA TEMPO, logis en
lu lando malproksima de ĉi tie,
bela juna ŝafistino. Ĉiutage ŝi
eliris el sia malgranda dometo,
kaj vokis siajn ŝafojn. Ili venis ĝoje al
ŝi, ĉar ili amis la karan junan ŝafistinon.
Sekvate de la ŝafoj kaj ŝafidoj, ŝi ekiris
laŭ la vojo, portante sian ŝafistan basto-
non. Ŝi marŝis malrapide, plezure rigar-
dante la belajn florojn laŭ la vojo, kaj
aŭskultante la dolĉajn kantojn de la bir-
doj. Sur preskaŭ ĉiu arbo sidis birdoj,
kiuj melodie kantis.

Fine la ŝafistino alvenis al granda kam-
po, kies herbo estis mola, densa kaj bon-
gusta por la ŝafoj. Ŝi ĉirkaŭrigardis, por
elekti arbon sub kiu ŝi sidos, kaj elektis
grandan maljunan ulnon. Sub tiu ŝi sidi-
ĝis, kaj diris al la ŝafoj kaj ŝafidoj, "Di-
siru ĉien, por vin paŝti en ĉi tiu agrabla
kampo. Mi restos ĉi tie en la ombro, ĉar
la suno brilas tre varme hodiaŭ."

Tial la ŝafaro obeis al la paŝtistino, kaj
disiris ĉien en la kampo, ĝoje mangante la
bongustan herbon, kaj blekante unu al
la alia. La ŝafistino metis la ŝafistan bas-
tonon sur la teron apud si, kaj metis sian
ĉapelon sur la bastonon. Tiam ŝi elpren-
is el la poŝo malgrandan libron. Ĝi estis
treege interesa libro, enhavanta rakon-
tojn pri la feinoj kiuj loĝas en ĉiu arbaro,
kaj flanko de ĉiu rivereto, kaj havas siajn
hejmojn en la floroj, aŭ sub la folioj de la
arbetaĵoj. La ŝafistino multe ŝatis legi
tiajn rakontojn, kaj plene kredis ke tiaj
feinoj ekzistas, kaj ke ili helpas homojn
kiujn ili amas, aŭ malhelpas la sukceson
de homoj kiujn ili malamas. Ŝi treege de-
ziris vidi feinon, kaj esperis ĉiutage ke
subite venos antaŭ ŝiajn okulojn tia es-
taĵo.

La tutan matenon la juna ŝafistino sidis
sub la ulno, legante tiun interesan libron.
Ŝi estis tiel interesata, ke ŝi tute forgesis
pri la varmeco de la tago, pri la belaj kan-
toj de la birdoj, eĉ pri la ŝafaro.

Guste je tagmezo, la knabino finis la in-
teresan libron, kaj ŝiaj pensoj revenis de
la lando de la feinoj. Subite ŝi rememo-
ris ke ŝi sidas sub la ulno en granda
kampo, kaj ŝi ĉirkaŭrigardis por vidi la
ŝafojn. Sed ŝi vidis neniun ŝafon, neniun
ŝafidon. Ŝi eĉ ne aŭdis la blekadon de
la ŝafidoj, nek la respondan blekadon de
la ŝafinoj, kiuj zorgas pri siaj idoj, kaj la
kompatinda ŝafistino estis terure timigita.
Ŝi forjetis la libron, ekkaptis la ĉapelon
kaj ŝafistan bastonon, kaj rapide starigis.
Metinte la ĉapelon oblikve sur la kapon,
pro sia rapidemo, ŝi kuris norden, ser-
ĉante la malaperintan ŝafaron. Sed ŝi
vidis neniun ŝafon, kaj aŭdis nenian ble-
kadon. Tiam ŝi kuris suden, rigardante
ĉien, sed ŝi vidis nur la arbojn, la herbon
kaj la florojn, kaj aŭdis nur la kantonon
de birdoj. Tiam, pli kaj pli timigite, ŝi
kuris orienten, ankoraŭ sen sukceso. Fine
ŝi kuris okcidenten, sed vidis nenion, aŭ-
dis nenion. Ekplorante, ŝi reiris al la
ulno, kaj sidigis sub ĝi, tute malespe-
rinte. Tie ŝi sidis kaj ploradis tutan hor-
on pri la perdita ŝafaro. Sed la plorado
neniel helpis al la afero. Ŝi nur laciĝis,
kaj ŝiaj okuloj ruĝiĝis. La birdoj anko-
raŭ kantis en la arboj, sed ili kantis ne-
nion pri loko al kiu forvadis la malsprita
ŝafaro. La ventetoj blovis dolĉe kontraŭ
la vizaĝo de la ploranta ŝafistino, sed ili
murmuris nenion pri trovado de la for-
vaginta ŝafaro.

Feliĉe, tamen, por la malĝoja ŝafistino,
preterpasis la kampon maljuna ŝafisto.
Li vidis la plorantan knabinon, kaj iris
al ŝi, por demandi kial ŝi ploras. Ŝi ra-
kontis al li pri la perdita ŝafaro. Ride-
tante, la maljuna ŝafisto sugestis al ŝi
metodon por retrovi la malspritajn bes-
tojn: "Lasu ilin trankvilaj, kaj ili re-
venos hejmen, portante post si la vostojn."
Ĉi tiun bonegan sugestion dankeme ak-
ceptis la ŝafistino, kies nomo estis "Bo-
peep."
D. A. K.

LA TRIA JARO POST EDZINIĜO

DE SINO. S. I.

[Unu el premiitaj verkaĵoj en konkurso proponita de redaktoro de *Jogaku-Sekai* "Lernantina Mondo," kondiĉe ke la verkaĵo devas esti ia ajn reala okazintaĵo al la verkantino mem, kiun ŝi skribis senkaŝe.]

LA 1AN OKT.: Vetero bela, en klara blua ĉielo naĝas kelkaj katunaj nuboj, la suno jetas sian aŭtunan radion sur ruĝintaj persimonfruktoj de najbara ĝardeno. Mi lavas la eron de substofa vesto de sinjoro (En Japanujo kutime edzino nomas sian edzon "Sinjoro") kiun mi lastan nokton malkunigis, kaj ĵus finas ĉion etendigi per maldika riza pasto sur tabulo. (Japana ordinara rimedo renovigi malpurigitan kaj sulkgigitan veston.) Ĉar Senĉjo estas jam dorminta, mi elprenas la gazeton nove ricevintan de Nagoja (nomo de urbeto) kaj legas iom da paĝoj. Ĝi estas la eldonajo de asocio organizita de nia samlernejantinaro. Ho, jam tri jaroj depost nia gradigo! Kiel la rememoro pri tiama vivado ŝajnas kvazaŭ sonĝo! Sur preskaŭ 20 paĝoj korespondajoj de samklasaninoj estas interese legeblaj. Jen la raporto de Fino. N— pri la virina universitato, kiun ŝi skribas laŭ stilo de Senŝonagon (famega antikva verkistino). Tio bone divenigas min pri ŝia kontenta mieno dum ŝi prenis plumon apud la fenestro en sia ĉambro. Jen la raporto de Fino. M— pri sia sperto kiel instruistino. Paŝtisto, kiu zorgas en kampo pri ŝafoj, sentas, oni diras, grandan plezuron. Multe pli grande ŝi do devas senti plezuron instrui geknabojn. Jen Sino. I— kiu estis rimarkinda spritulino el nia klaso ridigas legantojn, skribante ŝerce pri sia infaneto.

Jen naŭva Sino. O— rakontas pri sia propra sperto de fuŝoj. Ho, kiom dolore ĉiuj ŝiaj vortoj pikas mian bruston! Plue, diversaj korespondajoj sinceraj kaj nekaŝemaj pri idealoj kaj spertoj multe interesas min. Tre amuze estas vidi ke tiuj ĝermoj kiuj iafoje estis kune kulturataj en la sama lernĝardeno nun beligiĝas aŭ bonodorigiĝas kiel floroj aŭ fruktoj respektive je diversaj rangoj kaj situacioj.

Sed, terure pripensl kio okazis al mi

mem! Unufoje malliberigate de neatendita malfeliĉo, mi trovas ĉion kontraŭ mi. Estis je la fino de jaro pasinta, kiam ni transloĝis tien ĉi, nevole forlasinte longloĝintan domon ĉe Nagoja. Tiu ĉi nuna mizera vivado! Kompato por sinjoro estas neesprimeble profunda, kaj al mi mem, la idealo kiun mi entenis nur antaŭ tri jaroj estas pereinta kvazaŭ momenta sonĝo!

Pripensante pri tiuj klasaninoj kiuj alte leviĝis je pozicio, mi ne povas subpremi la senton de envio—prefere jaluzo, kvankam mi bone scias la malvirtecon en tio. Post momenta revado mi ekvekiĝas kaj diras, "Ho mi, kia malsagulino! Oni provu sorton, ne estu tiel timema ke oni estas mokata de sorto." Tiel decidante mi turnas al alia temo "Monda Saĝeco" de Prof. M—.

La 2an Okt.: Kiel dezirita de sinjoro, mi iras horlogiston apud Taĉibana Ponto kaj mendas riparon. Sur hejmenvojo mi rondiras fiŝvendejon por aĉeti iom por vespermangaĵo. Ĉiuj fiŝoj hodiaŭ estas terure multekostaj; mi apenaŭ aĉetas amaseton da sardeloj por 5 sd. Kiam mi revenas ĝis la angulo de Honĉo strato, Senĉjo sur mia dorso ekvekiĝas kaj forte ekkrias.

Unu persimono aĉetita por li estas efektiva kvietigaĵo. Ĉe Maruso, granda drapendisto en tiu ĉi urbo, ĵus komencis vendego.

La butikio estas brile ornamita, kaj oni penas inviti aĉetojn, eĉ proponante por la unua premio de loterio hipotekan debenturon de 100 Sm. Kvankam estas neniam afero rilate al mi de estanta cirkonstanco, mi momente haltas antaŭ la butikio, por rigardi trans la fenestrovitro ĉarmajn elmontraĵojn. Tie ĉi okazas neatendaĵo! Sino. Nose, samklasanino, de kiu mi disigiĝis antaŭ tri jaroj, ĵus eliras el la butikio alportante kovrildrapon de aĉetaĵoj. Okaze niaj du vidoj renkontas unu la

alian. "Ho ve, hontinde! Ĉu ne estas ia kasejo apude? Kiel mi povas al ŝi montri tiun ĉi mizeregan figuron?" La vizaĝo mia subite varmiĝas, membroj sentiĝas kvazaŭ kuntiritaj, kaj mi vere ne scias kion fari je la momento.

"Ho, kara amikino, ĉu vi loĝas en tiu ĉi urbo kiel oni diras? Mi tre ĝojas vin vidi." Nun alproksimiĝante al mi, "Ho, jen estas knabeto; kiel aminda! Ou Sro. via edzo ankaŭ sanas bone?

"Jes, tre bone!"

Tiel dirante ŝi transigas la kunportajon de unu mano en la alian, kiam la dekstra ringafingro ŝia ekbrilas pro diamanto. Nun nenia rimedo, mi pensas, por forkuri de ŝi. Mia koro, lomete trankviliĝante, rememoras ke ŝi estis en lernejo la plej afabla el samklasaninoj. Mi tiam salutas ŝin kore. Per ŝia daŭra rakonto mi sciiĝas ke ĉar Sro. ŝia edzo (kiu apartenis al Nagoja regimento) estis sendita tien ĉi, ŝi ankaŭ venis je la mezo de la antaŭa monato, kaj ankaŭ tuj post alveno ŝi serĉis mian loĝejon sensukcese.

"Pro kompatado de Dio," ŝi diras tre ĝojante pri hodiaŭa renkonto, kaj demandas mian adreson.

"Sajnus malĝentile kontraŭ via afableco, sed pardonu al mi ke mi ne kuragu sciiĝi al vi mian adreson."

"Sed amikino, mi tre deziras viziti vin ofte; mia loĝejo staras sub la alta kverkarbo antaŭ pordego de la soldatejo, oni povas facile rekonii ĝin. Kaj la via?"

Ŝi tiam plendas pri mia nesciigo, kaj mi estas devigata post tio diri al ŝi pri detalo de mia adreso; aldonante "Sed ne miru je malpureco de mia domo, kiam vi vizitas," mi disigiĝas de ŝi. Sajnas al mi ke Sino. Nose fariĝis pli afabla kaj pli bela ol kiam ŝi estis fraŭlino. Tio estus pro tio, ke ŝi nun sin trovas je kontenta circonstanco.

(La 3an, 4an kaj 5an la tradukanto forigas.)

La 6an Okt.: Posttagmeze Sino. Nose vizitis min. Spite ŝiaj vortoj mi ja ne atendis vidi ŝin ĉe mi. Kortuŝate de dankema sento pro ŝia amikeco, mi forgesas honton montri al ŝi tiun ĉi malpuran kaj mallarĝan dometon. Dum kelkaj minutoj ni interŝanĝas kunparolon pri nuntempajoj de ambaŭflankoj. Iom post iom la kunparolo revenas en lernejvivadon, kaj ni ambaŭ sentas kvazaŭ estus antaŭ edziniĝo. "Ja, neniam en tuta vivado estas pli amuza ol je fraŭlineco," diras ŝi, kaj kunparolo pri tiaj temaj ankoraŭ daŭriĝas senfine. Kvankam mi havas nenion por ŝin regali krom "kuntirgusta" teo, ŝi tre kontente restas ĉe mi ĝis la 4a.

* * * * *

La sorto de l'hemo ja estas kvazaŭ surrakva kreskajo sur malkvieta ondo! Ĉu naĝi, ĉu subakvigi, neniel kaj neniam estas difinite. Mi tial konkludas ke feliĉo estas malfeliĉo, kaj male, t. e., nenia difinita modelo ekzistas por distingi unu de alia. Aŭskultante rakontojn de Sino. Nose, mi komprenas ke multaj saĝne estus tiel feliĉaj ke oni envidus ilin, tamen reale ili pleniĝas je ĉagreno, eĉ iam subpreman-te larmojn nekonatajn. Turnante al nia vivado,—ni paro estas tute sana, Senĉjo kreskas aminde tagon post tago, kaj printempa varmeta sunradio tiel brilas en tiun ĉi dometon kiel en tiujn de riĉeguloj. Kion do ni bezonas plu? Estas nenia kaŭzo al mi ĝemi aŭ honti. Hodiaŭ mi fariĝas, dank al ŝia amikeco, tiel kuraga ke mi volonte kontraŭbatalos ĉiujn ĉagrenojn venontajn. Ŝi alportas al ni "kastano-jokan" (ia dolĉa pasto farata el fabo) kaj tre bonodorajn pomojn. Ĝojinde pripensi ke kiam sinjoro revenos hejmen post nelonge, li multe ŝatos ilin.

El la japana tradukis

K. Takahaŝi,

Kabe, Aki,

Japanujo.

ANTAŬZORGO.

Foje, sur ŝipo dum forta ventego, unu el la ŝipservistoj ekrigardis en ĉambreton de kamparano, kaj kun mire vidis lin staranta sur la kapo, dum liaj piedoj firtris en la aero. La servisto ekkriis:

"Pro Dio, kion do vi faras?"

"Mi tiel staras," respondis la kamparano, "por ke, se la ŝipo renversiĝos, mi certe falos sur la piedojn anstataŭ sur la kapon."

El la angla tradukis

J. A. Kelse.

BAPTO DE CIGANIDO

RAJTIGITA TRADUKO EL LA VERKO DE HELENE CHRISTALLER.

[En la lastpasintaj jaroj mia bofratino, Helene Christaller, akiris multan ŝaton inter literaturamantoj. Ŝiaj rakontoj montras la eminentan kapablon de la poetino, ekkoni kaj prezenti la sentojn de plej diferencaj animoj; same rimarkinda estas la komprenemo pri naturo kaj la bonkora humoro, kiun oni ofte renkontas. Jen estas prezentata al la legantaro de Amerika Esperantisto unu rakonto el "Meine Waldhauser" ("Miaj Walhäuseranoj"). Mia bofratino afable permesis al mi tradukon de ŝiaj verkoj en Esperanton. La nuna traduko estas farata de mia filo Wilhelm, kaj kun gojo kaj ioma fiero li ĝin prezentas al la amerikaj samideanoj:—Paul Christaller, Stuttgart, Germanujo.]

CIGANOJ en la vilaĝeto!" kriis la infanoj, veninte el la lerneĝo. "Du verdaj veturiloj staras ĉe la poplejo apud la bakisto Michel! Kaj ili havas infaneton, hodiaŭ nokte oni por ĝi venigis Rosinon."

La Waldhäuseranoj baldaŭ bone spertis ke la ciganoj havas infaneton, ĉar arego da virinoj, infanoj kaj viroj plenigis la farmojn kaj domojn, kaj la infaneto "estis bona okazo por eksciti" la bonfaremecon de la virinoj.

"Tute nuda, tute nuda," ĝemis beleta bruno virino en ĉifonoj kun akre ruĝa kaptuko, en sia fremdlanda lingvo. "Neniu ĉemizo, neniu tuko, nenio varma." Ŝi montris la malplenajn manojn kaj mallevis la kapon por montri la senhelpon de la juna mondano.

Kion alian Rike Scholler povis fari ol iri al la tre uzata tolaĵaro de ŝiaj kvar infanoj kaj serĉi provizoran vestaĵon por la ciganido? Kun la "Missionsgret" babiladis maljuna virino, kies grizaj haroj pendis super la sorĉistina vizaĝo.

"Kompatinda virino, preskaŭ mortis dum nokto, tiom da doloroj kaj nenia mango, ok infanoj kaj tiel malsana nun. Nek domo nek lito, nur ĉifonoj, tiaj . . ." Ŝi dume montris sian disŝiritan vestaĵon.

Ŝi pensis pri ŝiaj propraj tri filinoj. Eĉ maljunan kokinon ŝi estis oferinta la lastan fojon. Dum ŝi tiel pensis, ŝi jam prenis panbulon el la ŝranko kaj metis kelkajn ovojn en la korbon de la virine.

Tuj poste, beleta duenkreskita knabino frapis al la zorge fermita pordo de la forĝejo. La plej maljuna filo malfermis al ŝi; li estis fulgenigra kaj havis antaŭtukon, kaj la fajro fantome flamis malantaŭ li, kiam li eliris. La ciganino levis melan-kollajn grandajn okulojn kaj etendis pete

la maldikajn brunajn manojn. Per kantanta tono ŝi komencis: "Mi petas, bona bela viro," Hannes rikanis flatite. "Malgranda infano, neniu lakto, ĉloma plorado. . . . Maruschka kantas, sed nenio eŝkas. Bona viro havas tiom da bovinoj . . ." Kun tio ŝi prezentis al li grandegan poton (de kiu oni estus povinta nutri dudek suĉinfanojn unu tutan tagon), kaj ridetis dolĉe kaj petegante.

"Tia sorĉistino," murmuris Hannes kaj prenis la poton, "bona, bela viro—." Li viŝis per mano ŝiajn maldensajn ruĝ-blondajn lipharojn, por kaŝi sian plaĉon, ekrigardis timeme la mastran domon kaj malsupreniris tiam en la kelon, kie li verŝis la plej grandan laktujon en la poton de l'ciganino.

La malgranda sorĉistino profitis lian foreston por rapide ĉirkaŭrigardi, kaj meti senmastran martelon en sian brusttukon. Sed kun la plej senkulpa kaj dolĉa infana videto ŝi tuj poste prenis la lakton kaj kontente foriris per rapidemaj nudaj piedoj.

La tuta vilaĝo devis kunsenti pri la familia afero de la ciganoj, ankaŭ la pastro-domo. Post kiam ĝiaj loĝantoj kelkfoje estis petataj pri materiaj helpoj, solene venis alian matenon la plej maljuna cigano, grizbukla eksterorde malpurega, pentrinda viro, kiu petis pri la bapto de sia plej juna nepo.

"Ĉu vi estas evangeliĉana aŭ katolika pastro?" li demandis la maljunan pastron Wernér.

"Evangeliĉana."

"Hm," meditante diris la maljunulo, "sed kristano tamen vi estas?"

"Certe," respondis kun rideto la pastro.

"Nu bone, baptu la infanon kristano; kiam ni rajtas veni?"

"Post du horoj en la preĝejon."

La cigano profunde sin klinis. "Ni tie estos ĉiuj."

Du horojn poste oni aŭdis bruon kaj tumulton sur la strato; vistonoj aŭdiĝis, klarnetoj flutis, kaj la tuta strato alkuris. Estis la procesio al baptito. Antaŭe la junaj viroj kun instrumentoj, malantaŭ ili tuta bando da brunaj infanoj, ĉirkaŭ dudek ĉiuj nudpiedaj kaj ĉifonvestitaj, sed kun floroj en la malordigita nigra hararo kaj en la manoj. Poste kvar aŭ kvin junaj knabinoj. La malgranda martelŝtelintino portis la baptoton. Ŝi estis iomete pompe vestita. Ĉirkaŭ la kokso flirtis ruĝa skarpo kaj akre ruĝaj geranifloroj brilis en ŝiaj neordigitaj bukloj.

La tuta irantaro sin movis en danca paŝo tra la vilaĝo. La infanoj ĝojkriis kaj saltetis, la knabinoj paŝadis gracie aŭ dancis per la beletaj nudaj piedoj en la hela polvo de l' strato, ĝis kiam la oraj ringoj je iliaj oreloj sonis.

La Waldhausen'anoj, almenaŭ la plaj, estis juste ekscititaj. "Se ili almenaŭ ludus pian himnon," diris la Missionsgret. "Malpia popolo, dancas al la sankta baptito kvazaŭ estus kermeso!" oni murmuris malkontente.

La maljuna pastro mem prenis sur sin bapti la infanon, de sia juna vikario li ne volis postuli ĝin, ĉar eĉ la akusistino estis rifuzinta kuniri en la idolana albapta procesio.

Sed ĉio bone sukcesis. La viroj kondutis solene kiel hispanaj eminentuloj, la virinoj mallevis la kapojn kiel plaj pentantinoj, kaj ke unu el ili ŝteletis iom de bapta akvo por iu superŝtifa ĉelo, la pastro malsevere ignoris. Nur la preĝoservisto mokis pri la malplena stana ofertelereto, sed lia edzino informis lin, ke li devus esti kontenta ke la bando ne forprenis eĉ la telereton; tion li bone komprenis kaj fariĝis kontenta.

La ciganopatrinoj dume estis preparintaj la kolektitan baptomangaĵon, kaj, je ĉagreno de la Waldhausen 'aj maljunuloj kaj je amuzego de iliaj infanoj, aŭdiĝis ĝis malfrue en la nokto violonado, kantaĉo kaj dancado el la du verdaj vagonoj, kiu ne ĉesis ĝis kiam la policano, malfrue

vespere, ordonis silenton al la gaja rondo.

La sekvintan matenon aperis en la pastra domo du sovaĝe aspektantaj, belaj, junaj viroj kun violenoj ĉe la brako, kiuj deziris paroli al sinjoro pastro kaj lia familio. Kiam Annete kaj ŝia patro eniris, la du viroj sin klinis solene, kaj la pli maljuna komencis malfacile kompreneblan alparolon, el kiu la pastro elĉerpis ke, pro dankemo pro la donita beno de la eklezio, ili volis ĝojigi la pastran domon per koncerto.

Post mallonga kompreniĝo inter si, ili metis la violonon al mentono, kaj mirinde klara duvoĉa tono sonis longe daŭrante tra la ĉambro, kaj tiam eliĝis kvazaŭ perloj sub iliaj manoj, sinkapto de tonoj, sintrovo, ĝojkrio kaj trilado, ĝis kiam la koro de Annete kunsaltetis.

Ankaŭ la vikario estis mallaŭte alveninta kaj staris malantaŭ la seĝo de Anna, kaj la servistino aŭskultis ĉe la pordofendo. Tiam la pli juna cigano antaŭiris unu paŝon kaj diris kun mirinde beleta, kavallira klino, pri kiu la vikario lin enviegis:

"Ario, sole por la bela fraŭlino."

Momenton li meditis; la alia mallevis la violonon. "Li estas improvizisto," li diris fiere pri la kunulo al la aŭdantoj.

Nun komencis la junulo, la nudan brunan piedon iomete antaŭmetante, la kvazaŭ brulantajn okulojn direktante sur la knabino. Kaj la maldika mano ellogis de la malgranda violono ravajn tonojn. Tio flutis kiel najtingaloj en varma junia nokto, tio sopiris pro malfeliĉo kaj supren saltis pro ĝojego, la tuta knabo kun sia violono fariĝis entuziasmiganta amokanto. Per kelkaj melankoliaj akordoj li finis.

La knabino kvazaŭ vekigis el revo. Ŝi sin levis.

"Mi vin dankas," ŝi diris mallaŭte kaj donis al ambaŭ la manon. Tiam ŝi faris signon al la servistino, kiu prezentis al la ciganoj glason da vino, ankaŭ la aliaj partoprenis la trinkadon, kaj Annete trinkis al la sano de la muzikantoj. Sed la afabla rigardo, kiun ŝi donacis al la improvizisto, kaŭzis al la vikario sendorman nokton kaj li estis ĝoja, kiam li aŭdis tra la nokta silento la knaradon de la verdaj veturiloj, kiuj forlaŭsis la vilaĝon.

La sekvintan tagon, mankis al la vikario lia pluvombrelo, kaj li insistis ke la ciganoj ĝin forprenis. Tion la pastrofilino paste kontraŭdiris, atentigante lin, ke jam du el liaj ombreloj vagas en la ĉirkaŭaĵo ĝis nerevido, kaj ke tiu ĉi tria

jam kvinfoje estis realportita al sia mastro de vilaĝanoj; al tio la vikario nenion povis rediri, ĉar ĝi estis efektive vera.

El la germana tradukis

Wilhelm Christaller,
Stuttgart, Germanujo.

LA AZENBLEKO

LA NUNTEMPA AZENO estas nur mizera grandlipulo, grandorela kvarpledulo, tio estas, nura azeno. Sed en la antikvaj tempoj, antaŭ multe da miljaroj, kiam la azeno estis la plej bona amiko de la homo, ĝia naturo tre malsimilis al la nuna. Ĝia mieno estis treege bela; ĝia muzika soprana voĉo estis tre dolĉa; la belecon de ĝia vizaĝo enviis ĉiuj aliaj bestoj; mallongavorte, ĝi povis juste esti nomata la mirindaĵo de la besta regno. Ĝi estis nedisigebla kunvivanto de la homo, kaj rekompence ricevis la plej distingitan sindonnan zorgon, kvazaŭ ĝi estus la princido de Tartarujo.

Iam, forgesante la netakseblan bonon, kiun ĝi kaj ĝiaj prapatroj ĝuis ĉe riĉulo nomita Paŭĉjo, fiera pro la laŭdoj de siaj similuloj, kaj kredeble pro la fiatado de la homoj, la azeno volis provi liberan kaj sendependan vivon. Nenion sceliginte al sia mastro, nek al la servisto, la azeno forkuris tra la kamparo en la montojn, opiniante ke ĝi renkontos inter la ŝtonhavaĵ krutegaĵoj de la montaro pli grandajn plezurojn kaj indulgojn ol tiuj, kiujn ĝi estis atinginta dum sia restado en la mastrodomo. Tamen, post horoj da ĝojo ofte venas horoj da malĝojo, tial ĝi baldaŭ eksentis la punon de sia kulpo, ĉu pro la severeco de la vetero, ĉu pro la ektimoj kaŭzataj de la soleco, ĉu pro la timo ke la mastro sekvos kaj kaptos ĝin, ĉu fine pro la nekapableco trovi ĉiutage sian propran nutraĵon.

Kelkfoje ĝi sin kaŝis inter la montoj, kaj tiel ofte levis sian kapon por ruzobservi ĉu la mastro ĝin sekvas, ke ĝiaj oreloj plilongigis kaj baldaŭ atingis la nunan longecon. Altempe, suprenrampinte sur la rokojn, por ekvidi plej malproksime sian supozitan persekutanton, kaj fortege penante kapti per sia buŝo la malsufiĉan paŝtaĵon, kiu kreskas inter tiaj

krutaj rokoj, ĝi grade pligrandigis supermezure la amplekson de sia buŝo, kiel oni povas ankoraŭ nuntempe vidi.

Pro la nemulta kaj maldelikata nutraĵo, kune kun la malplaĉaj atmosferaj sekvoj, ĝia voĉo ekmalakordigis rapide, ĝia muzika aŭdado malagordigis, ĝis kiam ĝia kantado perdis sian tutan belsonadon, kiel oni povas ĉiutage nun rimarki, kiam la kamparanoj kondukas la azenojn al la akvotrinkejoj kvarope aŭ sesope.

Multajn jarojn pasigis la malfeliĉa sovaĝa azeno, trakurante la montojn, kaj ĝuante ŝajnan sendependecon, sed efektive perdante la belecon kaj akirante la bedaŭrindajn neperfektecojn, kiuj ĝin hodiaŭ karakterizas. Fine ĝi kutimis al tia sovaĝa vivado: ne plu ĝi pensis reveni en sian antaŭan loĝejon. Ĉiutage satiginte siajn bezonojn, ĝi ekzercis sian kapablon, kantante himnojn al la belega Naturo, resonigante sian raŭkan kaj potencan blekon tra ĉiuj valoj, ripetigante la eĥon kontraŭ ĉiuj montoj. La azeno havis tiom da plezuro, ke ŝajnis al ĝi ke ĝi jam atingis la idealon de sia gento, kiu konsistas el la plej absoluta libereco, kune kun tuta forestado de ĉia laborado.

Laste, la senindulga ĉielo forprenis sian trompan afablecon, kaj la nedankema tero rifuzis provizaĵon al la azeno: daŭra senpluvo alvenis, la paŝtoherboj sekigis, la tero ne plu produktis la herbon, la fontoj ĉesis flui, kaj ĉiuj meteorologiaj elementoj kvazaŭ konspiris kontraŭ la malfeliĉa besto. Ĝi esperis atingi duoblan feliĉon, kaj penis plenumi tiun celon, tamen ĝi ne trovis eĉ la dekonon: male, la suferado plimultiĝis duoble.

Tiam la azeno ekpensis, kaj fine fariĝis saĝa; ĝi rememoris sian antaŭtempnan bonstaton, la sufiĉecon en la hejmo de sia mastro, la karesojn ricevitajn, la admiron kun kiu oni ĝin rigardis, kaj ĉion, kio faris ĝian antaŭan feliĉecon. La for-

kurinto, malgrasega, kaj konfuzita pro honto je sia sendankeco, ĝemante kaj bedaŭrante sian transloĝadon, decidis reiri en sian unuan hejmon. Sed antaŭ ol forlasi la montojn, ĝi jure promesis al si neniam esprimi doloron, kia ajn estu la puno, kiun ĝia mastro donos al ĝi.

Post kelktaga vojaĝo, traŭrante la kamparon, prenante nenian manĝaĵon, kaj pripensante la estontajn suferojn, la sovaĝa malklera besto alvenis al la pordo de sia antaŭa mastro, ektuŝis tre singardeme, puŝis iomete, kaj sin tute modeste prezentis, preta por akcepti ĉiajn punojn. Tuj kiam la mastro aŭdis la azenaĉon, li fariĝis tre ekscitata, rapide malfermis la pordon, kaj furioze ricevis la beston. Preninte bastonon, li tiel forte kaj senkompate ekbatis la azenon ke la mastrino kaj servisto petis kompaton pro ĝi. Sed ju pli ili petis, des pli li batis, kaj eĉ per glavo li ĝin batis. Tage kaj nokte post tio li submetis ĝin al la plej malfacila laboro; li rigardis ĝin kun malestimo; kiel eble pli multe li malpliigis al ĝi la mango-

porcion; buŝumon li metis inter ĝiaj lipegoj; kaj entute li kondamnis ĝin esti la plej malestiminda el ĉiuj bestoj.

Sed la azeno, fidela al sia juro neniam plendi, jaron post jaro mirinde trankvilanime kaj rezigne suferis la konsekvencojn de sia forkurado, nenian plendon ekparolante, kaj ne dirante eĉ unu vorton, kiam oni ĝin batis, eĉ kvankam la punado estu daŭrigota miljarojn post miljaroj. Kiam ajn la suno aperis ĉe la horizonto, aŭ kiam la azeno rememoris la felicajn horojn de sia estinta sendependeco, tiam ĝi disĵetis en la aeron sian resonantan blekon, por prikantegi la agrablan malvarmecon de la valoj, la plezurojn de la herbejoj, kaj la eternan silenton de la montoj. Unuvorte, ĝi kvazaŭe blekis tutan paŝtistan poemon al la ĉarmo de la Naturo. Ĝia rauka eĥo ripetigis ĉie, kaj inter la idoj de la idoj de la azeno ĝi restis kiel glora rememoro de ĝia sovaĝa libereco.

Mariano Mojado.

JOZEFINO.

Malgaja estas Jozefino,
Suferante profundkore;
La fianĉo forveturis,
Kaj ŝi ploras tre dolore.

Ekkomencis militado,
Pro maljusta landtirano;
Petro, juna kuraĝulo,
Estas ja respublikano.

“La Patrujo min alvokas,
Ploru ne, ho karulino!
Mi neniam vin forgesos,
Mi vin amos ĝis la fino!”

Tempo pasis. La junulo
Ne revenis laŭpromese;
Esperante lin ŝi vivis,
Atendante lin senĉese.

Unu tagon posttagmeze
Leteron iu vir' alportis,
Sciigantan ke l' amanto
Sur la bataalkampo mortis.

Jam de longe korrompita,
Estas ŝi frenezulino;
Kaj ankoraŭ lin atendas,
Kompatinda Jozefino!

JOS. MAESTRE,

Kubo.

KELKAJ EPIGRAMOJ.

Tiu, kiu portas revolveron en sia koro estas pli danĝera ol tiu, kiu ĝin portas en sia poŝo; ĉar la duan vi povas ataki, sed ne la unuan.

Faru ke la homoj ridu, ĉar plori ili jam povas sen via helpo.

La plej granda donaco estas, donaci konfidon.

Estas pli bone ke vi havu monon, ol ke la mono vin havu.

Malfermitaj okuloj kaj malfermitaj manoj estas bonaj; malfermita buŝo estas malbona.

La homo vivas tiel longe, kiel li amas.

Kiam vi laboras pro la socio vi ne havas mastron sed mastrojn; komprenu mem la diferencon.

El la idia tradukis

S. Weinstein.

SENFADENA ESPERANTO

DE LA TEMPO de mia juneco mi ŝatis la studadon. Scienco kaj elektro speciale interesis min. Bonŝance mia patro havis sufiĉe da mono por doni al mi bonan edukadon en la universitato, kie mi faris esplorajn eksperimentojn. Mi ankaŭ konstruis kaj uzis senfadenajn telegrafajn kaj telefonajn aparatojn. Dum la lasta jaro de mia kurso, mi tre interesigis pri Esperanto, la internacia lingvo, kiun mi sufiĉe studis por povi facile paroli kaj skribi.

Mi finis mian universitatan kurson kun sufiĉa honoro por multe plaĉi al mia patro, kiu permesis al mi konstrui elektran laboratorion ĉe nia somera hejmo, proksime de la marbordo. Tie mi instalas miajn senfadenajn telegrafajn kaj telefonajn aparatojn, kiuj bone sukcesis.

Laŭ la principo de senfadena telegrafado, la telegrafaj ondoj iras en ĉiujn direktojn; kaj, pro tio, mi koniĝis kun kelkaj telegrafistoj en diversaj partoj de la ĉirkaŭaj ŝtatoj. Inter tiuj speciale estis la telegrafistoj ĉe la naciaj vivsavaj stacioj laŭ la marbordoj. Ofte mi aŭdis la signalojn de suferado el ŝipoj proksimaj, kaj kun la entuziasmo de juneco, mi rapidis tien per aŭtomobilo, por helpi savi la malfeliĉulojn.

Unufoje mi subite vekigis je meznokto kaj, aŭdante signalojn de danĝero, elsaltis el mia lito kaj atente aŭskultis. La proksima vivsava stacio sensukcese penis trovi la lokon de la signaloj. Tiam, post tri aŭ kvar signaloj de danĝero, mi aŭdis kelkajn intermiksitajn signalojn, sekvitajn de silento.

Senpripense mi transiris de telegrafa al telefona aparato, kaj malrapide agordante ĝin, mi baldaŭ komencis aŭdi francajn vortojn ekscite parolatajn. Mi respondis: "Speak English."

Tuj sekvis la jena respondo en virina voĉo: "Not speak English."

Tiam mi diris, "Ĉu vi parolas esperante?"

Rapide venis respondo: "Jes! Jes!

Jes! Venu tuj aŭ ni dronos, nia ŝipo subakvigas, ĝia fundo rompiĝis kontraŭ la ŝtonegoj. Ni estas norde de la lumturo, la interspaco inter ni kaj ĝi estas eble mil metroj."

Mi respondis: "Mi petos helpon de la vivsava stacio kaj tuj venos en mia aŭtomobilo. Lumigu ĉiujn lanternojn kiel eble plej rapide."

Mi telefonis al la vivsava stacio, vestis min kaj en aŭtomobilo rapidis tien, portante kun mi raketon alligitan al ŝnuro. Ekvidinte la ŝipon, mi pafis la raketon sur la ferdekon, kie oni alligis ĝian ŝnuron al masto.

Tiam la viroj de la vivsava stacio venis kaj laŭ kutima maniero alportis ĉiujn homojn sendanĝere de la ŝipo al la lando. Post dekkvin minutoj la ŝipo subakvigis.

La ŝipo estas privata jaĥto de franca riĉulo. Neniu sur ĝi parolis angle, krom la telegrafisto, kiun ondego forportis de la ferdeko dum la ventego.

La fraŭlino kiu parolis al mi estis belulino el Svislando, amikino kaj gastino de la posedantoj de la jaĥto. Ŝi estis tre bone instruita, speciale en la scienco. Bonŝance ŝi interesigis je la senfadena telegrafa kaj telefona aparato, kaj dum la vojaĝo lernis uzi ilin, sed ŝi povis telegrafi nenion krom signaloj de danĝero. Ŝi estis bravulino, kiu, kiam la ŝipo estis subakviganta, restis tute sola en la kajuto kaj ĉiamaniere penis alvoki helpon per la senfadenaj aparatoj.

Ŝi kaj la ceteraj fariĝis gastoj de miaj gepatroj, kaj post kelkaj tagoj, kiam mi eltrovis ke ŝi estas tiel bona kaj sprita kiel ŝi estas bela kaj klera, ĉu vi povas miri ke mi guis ŝian kunecon?

Ofte ŝi diris, "Esperanto kaj vi savis al mi la vivon."

Kion mi respondis? Ne demandu. Sufiĉas diri, ke mi nun havas belan kunulinon kiu ĝuas esploradajn eksperimentojn tiel multe kiel mi,—speciale la senfadenan telefonadon.

Henry W. Fisher.

PAROLADO DE SENATANO VEST.

La plej bona amiko, kiun oni havas en la mondo, eble kontraŭstarigos, kaj fariĝos malamiko. La filo aŭ filino, kiun oni kun zorgo edukis, eble estos sendankema. Tiuj, kiuj estas plej amataj, al kiuj oni konfidas la konfidon. Oni povas malgajni sian monon, kiu eble forflugos de li je la tempo, kiam li plej ĝin bezonas. La reputacio, kiun oni havas, povas esti detruata per senzorga momento; kaj tiuj, kiuj volis genufleksi por honori homon sukcesan, povas unue ĵeti la ŝtonon de malico, kiam malsukceso sendas sian ombron ĉirkaŭ la kapon de tiu sama homo.

La sola tute sindona amiko, kiun oni povas havi en tiu ĉi sinamanta mondo, la amiko, kiu neniam forlasis la homon, estas lia hundo. La hundo restas fidela dum prospero aŭ malriĉeco, dum sano, aŭ malsano. Ĝi dormas sur la malvarma tero, kie blovas la vintra vento kaj furioze falas la neĝo, nur kondiĉe ke ĝi povu esti apud la sinjoro. Ĝi kisas la manon, kiu havas nenian manĝaĵon por doni. Ĝi le-

kos la vundojn, faritajn de la batalo kontraŭ kruela mondo. Ĝi gardas la domon de sia senhava sinjoro, kvazaŭ tiu estus regido.

Kiam ĉiuj aliaj amikoj foriras, la hundo restas. Kiam riĉeco malaperas, kaj bona reputacio forflugas, la amo de la hundo estas tiel fidela, kiel la trado de la suno trans la ĉielon. Se per malbonŝanco la sinjoro estas elpelata en la mondon, sola, senamika, kaj senhejma, la fide-la hundo petas nenian pli altan privilegion ol akompani lin por gardi kontraŭ danĝero kaj batali kontraŭ malamikoj.

Kaj kiam venas la lasta sceno, kaj la morto prenas la sinjoron en siajn brakojn, kiam li kuŝas sub la malvarma tero, kaj aliaj amikoj eble daŭras sengene sian vojon, jen apud la tombo troviĝas la nobla hundo, kun sia kapo inter siaj piedoj, kun la okuloj malgajaj sed malfermitaj en ĉiama gardado, fidela eĉ en la morto.

El la angla tradukis

HORACE M. STEVENS.

REVOJ.

Laŭ la marbordo ofte mi vagas,
Ho karulin', kaj sopiras je vi;
Trans la bluaĵo la manojn mi streĉas:
Ho karulino, revenu al mi!

Ofte, revante, mi ree vin vidas,
Ofte en sonĝo vi venas al mi;
Maro trankvila, pace dormanta,
Reportu la karulineton al mi!

Maro belega, vi kies ondetoj
Ĉiam ludadas, kantu al ŝi!
Diru al ŝi ke mi kore ŝin amas:
Ho, karulino, revenu al mi!

HARRY PERKINS.

IN 1865.

[Extract from a speech in the United States Senate by Charles S. Sumner, on a bill proposed in 1865, to authorize the use of the metric system of weights and measures.]

"There is something captivating in the idea of one system of weights and measures which shall be common to all the civilized world; so that at least in this particular, the confusion of Babel may be overcome. Kindred to this is that other idea of one system of money. And both

of these ideas are, perhaps, the forerunners of that grander idea of one language for all the civilized world. Philosophy does not despair of the fulfilment of this aspiration at some distant day; but a common system of weights and measures and a common system of money are already within the sphere of actual legislation. The work has already begun and it cannot cease until this great object is accomplished."

VERKO DE MAKSIM GORKIJ

La glacio kaj neĝo per nedetruanta kovrililo eterne vestas la supraĵojn de Alpoj, kaj regas super ili malvarma senparoleco—ŝarĝa silento de fieraj altaĵoj.

Senlima estas la dezerto de ĉielo super la supraĵoj de montoj, kaj sennombraj estas la malĝojaj okuloj de steloj super la neĝo de supraĵoj.

Ĉe la bazo de l' montoj tie, sur malvastaj ebenaĵoj de tero, la vivo maltrankvile kreskas, kaj suferas la lacigita posedanto de ebenaĵoj,—la homo.

En mallumaj kavoj de tero sonas ĝemo kaj rido, krioj de furiozo, murmurado de amo. . . . multsona estas la malaflaba muziko de vivo tera.

Sed la ŝarĝaj ĝemoj de homoj ne konfuzas la silenton de montaj supraĵoj kaj indiferentecon de steloj.

La glacio kaj neĝo per nedetruanta kovrililo eterne vestas la supraĵojn de Alpoj, kaj regas super ili malvarma senparoleco—ŝarĝa silento de fieraj altaĵoj.

Kaj kvazaŭ por tio, ke alia diru pri la malfeliĉo de tero kaj turmentoj de lacigintaj homoj—ĉe fundo de glacio, en la regno de eterna silento, sole kreskas malgaja monta kreskaĵo—Edelweiss.

Kaj super ĝi, en senfina dezerto de ĉielo, silente naĝas la fera suno, malĝoja lumas muta luno kaj senparole kaj tremante la steloj brulas. . . .

Kaj malvarma kovrilo de mallaŭteco, subirante la ĉielon, ĉirkaŭprenas nokte kaj tage la solan floron—Edelweiss.

El la rusa tradukta

B. Danŝin,
Moskvo, Rusujo.

PLUNGE OR WADE?

Editors, Amerika Esperantisto:

The Esperanto class for 1910-11 at the Manchester Institute of Arts and Sciences finished the "Complete Grammar of Esperanto" at its meeting last Thursday evening. That is to say, the students, including the principal of one of our public schools and several teachers in those schools, have not only "gone through" with the rules laid down, but have put into good Esperanto all the English exercises. The class began the last week in October, met once a week for recitation, and completed the course, absolutely and thoroughly, the middle of April.

I am moved to write this because I read the review by A. E. W. in the British Esperantist, in which he wrote of the comparative merits of the "plunge in" method and the "wade in method." I had three year's experience as a teacher of Esperanto with the "plunge in" method. We not only plunged, we actually floundered. Of course, we got somewhere, some of us, but at a fearful loss of energy, and at the loss, too, of good friends who at first plunged with us, but later retired. With the Kellerman grammar, this season, we held the interest and enthusiasm of all to the end.

Twenty-five of the grammars have been in use in Manchester this season. I sincerely hope there has been similar use of them throughout the country. It is a work which one can show to the best educators without being ashamed.

Sincerely yours,
E. J. Burnham,
Editor "Union."

EN LA PREĜEJO. "Amu vian najbaron same kiel vin mem," diris la pastro serioze al la Esperantistaro.

"Tomaso," paroletis la sinjorino al sia edzo (kiu loĝis najbare al belega juna Esperantista vidvino), "ni iru for; tiu ĉi ne estas loko por ni."

LEHMAN WENDELL.

Printing ? ? ?

ESPERANTO or ENGLISH

Have your work done by the first and best Esperanto printer in America.

Clearly accented type. Skilled workmen. Modern machinery.

Prices low. Workmanship careful. Material good.

Letterheads for Esperanto societies and officers.

ERNEST F. DOW, W. Newton Sta., Boston, Mass.

National Cathedral School for Boys (*Episcopal*)

*A Country School occupying its beautiful new home on
Mount St. Alban, Washington, D. C.*

This school exemplifies in the highest sense its reputation for being an ideal school for boys. It is under the direction of the Bishop of Washington. It has an able faculty and offers exceptional advantages in preparing boys for colleges and universities. All the attractions of the Capitol. Opportunity is given to hear and know men prominent in public life. Delightful location; campus of forty acres; magnificent new building, the most modern of its kind in America; large gymnasium. For catalogue, address,

E. L. GREGG, Headmaster,

Box ES

Special Congress Number

The October number of *Amerika Esperantisto* will be devoted entirely to articles describing the Seventh International Congress of Esperanto, which will be the largest of all congresses to date. No effort will be spared to make this a wonderfully interesting number, especially for propaganda. How many copies will you want, to give to your acquaintances? In lots of ten or more at five cents each. Fill out form as below:

American Esperantist Company, Washington, D. C.

Samideanoj:

Please find enclosed the sum of \$....., for which send me a

bundle ofcopies of the *Special Congress Number* as soon as published.

Name.....

Address.....

Date.....

La Sepa Internacia Kongreso

The Seventh International Congress

AN ĉi tiu artikolo ni klopodos doni nuran skizon pri la ĉefaj aferoj de la Sepa Internacia Kongreso de Esperanto. Doni plenan priskribon pri ĉio, kio okazis dum tiu mirinda kaj tre okupata semajno, estus tute neeble en la limoj de nia gazeto.

El tiuj, kiuj reprezentis la esperantistaron de Norda Ameriko, la plimulto estis, almenaŭ dum iom da la tempo, anoj de karavano—La Nordamerika Karavano—kies travivaĵojn kun Esperanto kaj esperantistoj en Anglujo, Francujo, Belgujo, Nederlando kaj Germanujo, antaŭ kaj post la Kongreso, oni priskribos en la sekvanta numero de AMERIKA ESPERANTISTO. La jena priskribo komencas je la alveno de la “Karavano” ĉe Antverpeno.

ALVENO EN ANTVERPENO.

Vidi esperantajn standardojn ĉie flirtantaj sur hoteloj, butikoj kaj aliaj konstruaĵoj, kaj vidi antaŭ si grandan elpendaĵon verdan kaj blankan, portantan la vortojn “Bonvenon al Esperantistoj” —ĉi tiu vido vere sufiĉis por rapidigi la korbatajn! Sajnis plue ke ĉiuj muzikaj kluboj en Belgujo estas kunvenintaj en tiu ĉi unu urbo, ĉar orkestra muziko ĉiuflanke tiel ĝoje sonoris ke la dumnuta promeno al la Granda Hotelo Weber ŝajnis kvazaŭ triumfa parado. Post alveno en la hotelo, estis malfacile fariĝi sufiĉe trankvila por partopreni la bonegan manĝeton antaŭmetitan sur aparta “karavana tablo.” Eĉ tie ĉi estis interrompoj, ĉar, krom la salutoj de amikoj inter la esperantistoj tie kaj ĉi tie, mencio pri aerŝipo forlogis unu areton post alia por “nur elkuri inter la manĝeroj” kaj atente rigardi supren, kie balanciĝis la

IN this article we shall attempt to give merely a sketch of the principal affairs of the Seventh International Congress of Esperanto. To give a full description of all that occurred during that wonderful and very busy week would be entirely impossible within the limits of our magazine.

A gathering of especial interest to all Esperantists whose mother-tongue is English, took place on Tuesday morning, in accordance with a suggestion made by Mr. Edwin C. Reed, Secretary of *The Esperanto Association of North America*. Here was something quite as unique and quite as interesting in its way as the sectional meetings described above. It is a well-known fact that the adage "blood is thicker than water," can often be interpreted to mean that races and nations of closely kindred blood, like brothers and sisters in one house, often find more occasions for annoyance among themselves than they have against altogether foreign peoples. The somewhat hostile feeling all too often held by the Scotchman for the Englishman, the Englishman for the American, the Irishman for the Englishman, is a matter of common knowledge.

Here again, the olive branch was brought by Esperanto, and at least among the English-speaking Esperantists present at the Seventh Congress we may assert that real cordiality and friendly feeling existed. At nine o'clock the rather large room selected for this informal gathering was crowded, and standing room was at a premium. English was the prevailing nationality, then Scotch, then American, but Australia, Ireland, Canada and Wales were also represented in greater or less numbers. Rev. J. Cyprian Rust, a well-known Esperantist from England, presided, calling first upon Mr. Reed, then upon Mr. Mudie of London, then giving the floor to one after another speaker, of these various nationalities, in a lively discussion of the principles, methods, advantages and flaws of representative government, in an attempt to arrive at clearness of comprehension and unity of purpose on the matter of representative organization for international Esperantist affairs. This was by way of preparing for the very important meeting of the experimentally created "delegate body" to occur in the afternoon of this same day, and while no formal resolutions were passed, it was the consensus of opinion that the meeting had been of the greatest advantage to all, and had greatly

tojn sur kiuj premiĝis la respondeca devo voĉdoni pro kluboj kaj federacioj dum la venonta "delegitkunveno."

UNUA KUNVENO DE LA DELEGITARO.

Mardon posttagmeze okazis kunveno de tute unika karaktero. Multfoje ja kunvenis reprezentantaroj, ofte internaciaj. Sed ne antaŭe dum la mond vivo

kunvenis el multaj nacioj unulingva delegitaro, kies anoj,—viroj kaj virinoj rajte oficialigitaj por reprezenti societojn disigitajn tra diversaj landoj,—povus diskuti sen tradukistoj, sen tempoperdo, sen malkomprenado, kaj tute sen ia ling-

va malhelpo. Ne forgesbla estis la travivaĵo, kiam parolado post parolado, proksimume tridek, estis farata en flua Esperanto, vige, fervore, senprezare,—

ĉar estus preskaŭ neeble antaŭpretiĝi por la debato,—de parolantoj kiuj, oni sciis, estis jen franca, jen pola, jen hispana, jen germana, jen bohema, angla, skota,

itala, rusa, kvankam oni rekonis la nacion sole per la nomo anoncita de la prezidanto, aŭ per fizionomiaj trajtoj, kiuj al sperta rigardanto, sciigis pli-malpli klare. Jes, al la tuta mondo mankas

alia internacia organizaĵo tia, ĉu scienca societo, ĉu kongreso de juristaj spertuloj, ĉu religia kunveno, ĉu politika,—kiom ajn sincera, altruista, nobla en intenco,—kiun oni povus kompari kun tiu ĉi delegitaro rajtigita de esperantistaj grupoj

kaj asocioj! Tamen tiu esperantista kunveno estis nura eksperimento, la unua provo el sia speco, preskaŭ sensperta pri internaciaj parlamentaj reguloj.

Ĝin atendis aferoj profunde gravaj por la tutmonda esperantista movado, kaj por diskutado ĝi havis nur tre mallongan tempon; tial sento de korpreno pli-malpli forta elpenetris la dense plenan ĉambron ĝis post komenciĝis la debato. La principo proponita sub diver-

aided those Esperantists who were intrusted with the responsibility of casting votes for clubs and federations in the coming "delegate meeting."

FIRST DELEGATE MEETING.

On Tuesday afternoon occurred a meeting whose character was absolutely unique. Representative bodies have convened many a time, and many of them have been of international scope. But never before in the history of the world had there assembled a body of men and women, the duly authorized representatives of organizations, scattered among many nations, who could carry on their deliberations *in one language*, without need of interpreters, without loss of time, without any misunderstanding, and with absolutely no friction on linguistic matters. It was a never-to-be-forgotten experience, to hear speech after speech, some thirty in all, delivered in fluent Esperanto, eager, earnest, always impromptu—for previous preparation for the matters under discussion was almost entirely impossible, and to realize that the speaker on the floor was now a Frenchman, now a Pole, now a Spaniard, now a German, a Bohemian, an Englishman, a Scotchman, an Italian, a Russian, the nationality being evident in no way save in the name announced by the chairman, and to some extent by physical characteristics, which speak more or less clearly to the practiced observer. No, there is not an international organization in the world, whether it be a scientific body, a congress of juristic experts, a religious assembly, or a political gathering, however sincere, altruistic and lofty its purpose, which could compare in efficiency with this meeting of "authorized delegates" from Esperanto associations and federations. And this Esperantist meeting was an experiment, the first of its kind, comparatively unskilled in international parliamentary method, confronted by matters of vital importance to the whole Esperanto movement, and limited to but a very brief time for the sessions, so that a feeling of stress more or less pervaded the crowded hall until matters were well under way. The prin-

saj formoj dum du antaŭaj jaroj, de usonaj, francaj kaj germanaj esperantistoj, nun subtenata per la aprobo de Dro. Zamenhof,—propono pri reprezenta regado,—estis akceptata kaj firmigata; kaj sekve la delegitara kunveno, la parlamento kreita eksperimente por tiu ĉi okazo, estis alprenata kiel la normo sekvota de nun por internacia leĝfarado pri esperantista propagando kaj administrado. Kelkaj detaloj ankaŭ estis aranĝataj, sub la prezido de Profesoro Rollet de l'Isle el Parizo, prezidento de la Franca Esperantista Federacio, la plej granda inter naciaj organizaĵoj.

La speciala insigno portata de rajtigataj reprezentantoj estis ruĝa disketo pendanta de ruĝa rubando, kaj surhavana la vortojn "rajtigita delegito" nigre presitajn. Tiun bonegan metodon por elmontri anojn de specialaj aroj oni alie uzis, ĉar lingva-komitatoj portis verdan insignon, similan laŭ formo kaj grandeco, konstanta-komitatoj portis blankan, kaj anoj de la internacia financa komitato, flavan diskon. Tiamaniere pordistoj ŝparis la tempon por ekzameni aneckartojn, kaj ordinare devis nur rigardi la insignojn pendantajn de la kongresa stelo, kiam la portantoj trapasis la enirejojn.

PREZENTADO DE "KAATJE."

Mardon vespere la flandra operejo estis tute plenigita de atenta aŭdantaro. La prezentado de iu notinda dramo en la kongresa semajno jam fariĝis unu el la regulaj okazantaĵoj de la programo; kaj oni ĝin atendas kun multe da plezuro. La kutimo, komencita ĉe la plej fruaj kongresoj per iomete neprofesiaj prezentaĵoj, kaj pli-malpli simplaj dramoj, jam disvolvigis tiom, ke spertaj dramartistoj estas postulataj, kaj la teatraĵo elektita estas traduko de unu el la preferataj ĉefverkoj en la propra literaturo de tiuj nacioj kie laŭvice kunvenas la kongreso. Ekzemple, la prezentado antaŭ kelkaj jaroj, en Dreseno, de la "Ifigenio" de Goethe, tradukita de Dro Zamenhof kaj

ciple of representative government, urged in some form or other by American, French and German Esperantists for the past two years, now definitely proposed by Dr. Zamenhof, was accepted and established, so that the delegate body created as an experiment for this occasion, was sustained as the method of deliberation and decision hereafter to be followed in international affairs touching Esperantist propaganda and administration. Various details were also arranged, under the chairmanship of Prof. Rollet de L'Isle of Paris, president of the French Esperanto Federation, the largest of the national bodies.

The special badge worn by the "authorized delegates" was a red circle, suspended on a red ribbon, bearing the words, "rajtigita delegito," printed in black. This excellent system of designating members of special bodies was carried still further, in that members of the Lingva Komitato wore a green badge of similar size and shape, the members of the Konstanta Komitato a white badge, those of the International Financial Council, a yellow one. The doorkeepers were thus saved the time of examining entrance and membership cards, and as a rule needed only glance at these badges suspended to the congress emblem, as the persons passed through the entrances.

PRESENTATION OF "KAATJE."

Tuesday evening the Flemish Opera House was filled to its utmost capacity with an expectant audience. The presentation of some notable play during the Congress week has come to be one of the regular events of the program, and is one of those looked forward to with much pleasure. The custom, inaugurated at the earlier congresses with more or less amateur productions, and comparatively simple plays, has now proceeded to that point of development where histrionic talent is available, and the play chosen a translation from one of the favorite masterpieces in the native language of the country in which the successive congresses occur. The presentation some years ago in Dresden, for example, of Zamenhof's translation

lerte interpretata de la bone konataj geaktorj Emanuel kaj Hedwig Reicher, subtenitaj de bonega aktoraro, ankoraŭ ricevas entuziasman laŭdon inter kaj aktoroj kaj esperantistoj. Ĉe la Barcelona kongreso, tipa kataluna dramo de Gual, esperantigita de Pujula kaj prezentata de konataj katalunaj aktoroj, gajnis egale koran laŭdon. Ĉe Vaŝingtono unu el la plej ĉarmaj komedioj de Shakespeare, "Kiel Plaĉas al Vi," tradukita de Dro. Ivy Kellerman, ricevis belan interpretadon en arta eksterdoma prezentado, kaj fine por la Belga kongreso oni elektis flandran dramon admiratan de ĉiuj en ĝia propra lando.

La dramo "Kaatje," verkita de Paŭlo Spaak kaj bele esperantigita de Dro. Van der Biest, donas bonegan pentraĵon de la karaktero, idealoj, kaj esperoj de la flandra-holandia raso. La baraktado de persona individueco kontraŭ kutimaj metodoj de instruado, la amo al hejmo kaj patrujo, pacienca sindonemo kaj sindediĉo,—ĉiuj ĉi temoj estis montrataj laŭvice de la personoj kaj scenoj de tiu tre efektiva teatraĵo. La geaktorj Helene Bertrijn, Marie Verstraete, Magda Janssens, Karel van Rijj kaj Jules Verstraete,—ĉiuj el la Reĝa Teatro de Antverpeno,—interpretis siajn rolojn kun alta lerteco kaj plena uzpovo de Esperanto, ree pruvante,—se ja pruvo mankus,—la mirindan taŭgecon por teatra uzado de tiu tre muzika kaj belsona lingvo.

La dramon direktis Sroj. Gastaff de Lattin kaj Franz van Laer, kaj la estradon administris Sro. Arie van der Heuvel, energia reĝisoro al kiu tiu ĉi malfacila entrepreno grandmezure ŝuldas sian sukceson. Al ĉiu akto sekvis tiel entuziasma aplaŭdo ke la aktoroj devis respondi kelkfoje. Ankaŭ oni alvokis la verkiston de la dramo, kiu elpasis el sia loĝio sur la estradon por ricevi la saluton tiamaniere proponitan. Similan dankon oni donis al Dro. Van der Biest, la dramtradukinto, kaj fine la floramatoj

de Goethe's "Ifigenia," skilfully interpreted by the well-known actors Emanuel and Hedwig Reicher, supported by an excellent cast, is still a subject for enthusiastic praise among both actors and Esperantists. At the Congress in Barcelona, a typical Catalonian drama by Gual, translated into Esperanto by Pujula, and played by well known Catalonian actors, won equally cordial praise. In Washington one of Shakespeare's most charming comedies, "As You Like It," translated by Dr. Ivy Kellerman, was beautifully rendered in an effective outdoor presentation, and the Belgian Congress chose in its turn a Flemish play which is universally admired in its own country.

The drama "Kaatje," written by Paul Spaak and well translated into Esperanto by Dr. Van der Biest, gives an excellent portrayal of the character, the ideals and aspirations of the Flemish-Netherland race. The struggle of individuality against habitual methods of education, the love of home and country, patient self-sacrifice and devotion, all these were shown by one or another of the personages and scenes of this most effective play. The actors, Helene Bertrijn, Marie Verstraete, Wagda Janssens, Karel Van Rijj and Jules Verstraete, all from the Royal Theatre of Antwerp, interpreted their roles with rare skill and with perfect command of Esperanto, proving again, if proof were needed, the wonderful suitability for theatrical use of this most musical and sonorous language.

The play was directed by Messrs. Gustaff de Lattin and Frans van Laer, while the stage was under the control of Mr. Arie van der Heuvel, an efficient manager to whom is in large part due the success of this difficult undertaking.

After every act the applause was so enthusiastic the actors were compelled to respond several times. Furthermore, the author of the play was called for, and stepped from his box upon the stage to receive the tribute thus tendered. Similar greeting was given to Dr. Van der Biest, the indefatigable translator of the play, while the quantities of flowers presented to the actors gave final evi-

donacitaj al la aktoroj pruvis la entuziasman aprobon de la aŭdantaro.

DUA GENERALA KUNSIDO.

Merkredon matene la "rajtigita delegitaro," nun starigite kiel agada organizajo de la kongreso por ĝiaj administraj kunsidoj, kunvenis je la deka, sub la prezido de Sro. Van der Biest-Andelhof, por daŭrigi la laboradon komencitan dum la antaŭa posttagmezo. Pli bonigoj kaj aldonoj al la ĝeneralaj kongresaj reguloj estis proponitaj, plene diskutataj kaj akceptataj. Tiu kunsido estis (se eble) pli interesa ol la simila kunveno de la antaŭa tago, ĉar pli detalaj aferoj estis konsiderataj, pli multe de parolontoj petis aŭskulton, ŝajne pli multe da zorga pripenso estis donata al ĉiu voĉdono de la delegitoj. La notinde facila kaj rapida progreso de la diskutado, kie neniu parolis per sia naskiĝlingvo, kaj tamen neniu estis fremdulo, ree donis elokventan ateston pri la mirinda uzebleco de Esperanto. Tie ĉi estis kunveno vaste internacia, enhavante anojn de tre diversaj profesioj, de ĉiuj aĝoj, de tute malsimilaj temperamentoj, de ambaŭ seksoj, en kies kunsido la supozite utopia revo pri uzado de unu simpla neŭtrala komuna lingvo estis pruvata kaj funkcianta, sukcesante preskaŭ ĝis miraklo! Ĉeesti tiun unu kunsidon valoris la tutan vojaĝon al Antverpeno!

La "Aldono al la Reguloj," kiel pli bonigita kaj akceptita, estas trovebla aliloke en tiu ĉi numero.

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO.

Prezidanto Generalo Sebert malfermis la unuan kunvenon de la Internacia Scienca Asocio merkredon posttagmeze, en ĉambro multe tro malgranda por la nombro de ĉeestantoj, kaj tial ĝi tuj elmoviĝis en grandan salonon. La reporto de la sekretario, Profeso Paillot, estis legata kaj akceptata. Tiu raporto pri-traktis disvolviĝon de la organizaĵo, kaj prezentis la staton de afero pri eldonado de ĵurnalo, kiel organo de la Asocio.

Post iom da diskutado, oni transdonis al

dence of enthusiastic appreciation of the hearers.

ANOTHER GENERAL SESSION.

Wednesday morning the "Authorized delegates," now established as the working body of the Congress for its business sessions, convened at ten o'clock, with Dr. Van der Biest-Andelhof in the chair, for continuing the labors begun the preceding afternoon. Amendments and additions to the general "congress regulations" were taken up, fully discussed, and passed or rejected. This session was, if possible, even more interesting than that of the previous day, as more detailed matters were considered, more speakers asked for the floor and more careful thought seemed to be given by the delegates on every vote.

The marvelous ease and rapidity of progress of the meeting, where no one spoke his mother-tongue and yet no one was a "foreigner," again gave eloquent testimony of the marvelous efficacy of Esperanto. Here was an assembly very widely international, including members from the most diverse professions, of all ages, of extremely varied temperaments, and of both sexes, in which the supposedly Utopian idea of using one simple, neutral, common tongue, was being tried, and was *working* with almost miraculous success. To attend this one session was worth the whole voyage to Antwerp.

The "Addition to the Rules," as amended and adopted, will be found elsewhere in this number.

INTERNATIONAL SCIENTIFIC ASSOCIATION.


The first meeting of this organization was called to order by the president, General Sebert, Wednesday afternoon, in a room much too small for the number present. This necessitated immediate adjournment to a large hall. The report of the secretary, Prof. Paillot, was read and accepted. This report, beside dealing with the development of the organization, presented the status of affairs with regard to the publication of a magazine, official organ of the Association. After some discussion, the arranging of



DR. L. L. ZAMENHOF
Author of Esperanto



TWO SECTIONS OF THE



THE CONGRESS IN SESSION



SEVENTH INTERNATIONAL CONGRESS



TWO GROUPS OF AMERICAN
DELEGATES





H. TUCK SHERMAN
American Vice and Deputy
Consul-General at Antwerp



EDWIN C. REED
Delegate of the United States
Government to 7th Congress



DR. H. W. YEMANS
Representative of U. S. War Department
to 7th Congress



DR. IVY KELLERMAN-REED
One of the Vice-Presidents of the
7th Congress

komitato la aranĝadon de tiu afero. Nova regularo pri la interrilato inter la Asocio kaj ĝia ĵurnalo estis proponata kaj akceptata. Je la kunveno de la Asocio, kiu okazis vendredon matene, oni difinis kaj diskutis la nunan staton de la teknikaj vortaroj. Multe da tempo kaj da laboro jam estas elpezita je tiu ĉi grava tasko; kaj oni decidis de nun encentrigi la laboron sub zorgo de ĝenerala komisiono kies ĉefoficejo estos en Parizo ĉe la Sorbonne. Oni anoncis ke kredeble ekzistos esperantista fakoficejo ĉe la oka kongreso de aplikata hemio, kiu kunvenos ĉe Vaŝingtono kaj Nov-Jorko dum septembro, 1912.

T. E. K. A.

La "Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio," kiun oni facile nomas per la vorto formata (kiel supre) el la kvar ĉefliteroj, kunvenis merkredon matene, kaj diskutis la "606," kaj ankaŭ kelkajn raportojn pri laborado por blinduloj; kaj ekpreparis por enkonduki uzadon de Esperanto ĉe la internacia kongreso de kuracarto ĉe London en 1913.

ANTVERPENAJ KURACISTOJ KAJ FARMACISTOJ GASTIGAS.

La "Cercle Medical" kaj la "Société de Pharmacie" de Antverpeno aranĝis akcepton merkredon vespere, por siaj samprofesianoj inter la esperantaj kongresanoj. La prezidanto de la Cercle faris salutan paroladon al kiu respondis Dro. Zamenhof. Sekvis programo, tute en Esperanto, multe ĝuata de la kosmopolita aŭdantaro. Ĉiuj foriris de la akceptado konvinkitaj ke Antverpeno estas hejmo de gastameco, kaj ke tiu gastameco (kiel ofte en aliaj landoj) atingas plej altan disvolviĝon inter kuracistoj kaj farmacistoj. Se Droj. Van der Biest kaj Schoor efektivigos sian deziron, la Antverpenaj kuracistoj skribos siajn receptojn esperante, plene sciante ke la farmacistoj tute komprenos kaj ne faros erarojn.

this latter affair was put in the hands of a committee.

A new set of rules concerning the relation between the Association and its journal was proposed and adopted.

At the second meeting of the Association (which occurred Friday morning), the present status of the technical vocabularies was outlined and discussed. Much time and labor has already been expended on this important task, and it was decided to centralize the work from now on, putting a general commission in charge with headquarters at the Sorbonne in Paris.

Announcement was made of the prospective formation of an Esperanto Bureau at the Eighth Congress of Applied Chemistry, to be held in Washington and New York during September, 1912.

"TEKA."

The "Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio," conveniently designated by the word formed by the four initial letters as above, held a meeting Wednesday morning, and discussed "606," and reports on work for the blind, and took steps toward introducing the use of Esperanto at the International Congress of Medicine in London in 1913.

ANTWERP PHYSICIANS AND PHARMACISTS ENTERTAIN.

The *Cercle Medical* and *Société de Pharmacie* of Antwerp gave a reception on Wednesday evening, in honor of their confreres among the members of the Esperanto Congress. The president of the *Cercle* gave an address of welcome, to which Dr. Zamenhof responded. A program followed, given entirely in Esperanto, and was greatly enjoyed by the cosmopolitan audience. All left the reception convinced that Antwerp is the home of hospitality and that as frequently occurs in other lands also, this hospitality reaches its highest development among the physicians and pharmacists. If Doctors Van der Biest and Schoor have their way the Antwerp physicians will soon be prescribing in Esperanto, with full knowledge that the pharmacists will have a complete understanding and make no mistakes.

TRIA GENERALA KUNSIDO.

Triafoje la "delegitaro",—kiel oni komence ĝin nomis,—kunvenis por agada kunsido jaŭdon matene, sub la prezido de Sro. Mudie el Anglujo kaj poste de Dro Mybs el Germanujo. Iom diskutinte kelkajn diversajn proponojn, oni akceptis la sekvantan decidon, kiun en ĝia fina formo proponis Profesoro C. Bourlet, redaktoro de *La Revuo* :—

La Rajtigitaj Delegitoj de la esperantistaj societoj propagandaj, konvinkitaj ke estus dezirindaj,

1e, Generala organizajo por doni firman bazon al la oficialaj jam ekzistantaj institucioj, nome: la Konstanta Komitato de la Kongresoj, la Lingva Komitato kaj la Akademio, la Esperantista Centra Oficejo kaj ĝiaj oficialaj organoj.

2e, Unuiĝo de la naciaj esperantistaj societoj, por ilin subteni kaj interligi.

3e, Amikaj kaj efikaj interrilatoj inter la propagandaj kaj la specialaj, fakaj aŭ aplikaj societoj, kiel ekzemple U. E. A.

Decidas, ke ili elektas komision por studi la tutan demandon kaj prezenti, dum la Oka Kongreso al la Delegitoj, planon por efektivigo de tiuj deziroj. Tiu plano devos esti publikigita en OFICIALA GAZETO kaj konigita al la delegitoj almenaŭ tri monatoj antaŭ tiu kongreso.

La kunveno tiam donis atenton al la elekto de anoj por tiu komisiono, kaj post iom da diskutado sukcesis fari liston tute kontentigan al la tuta aro, kiu precipe serĉis, kiel ecojn taŭgajn por tiu grava tasko, organizan lertecon, agadan kapablecon, kaj ĝeneralan scion pro la diversaj esperantistaj laboroj. Oni elektis la sekvantajn :—Sroj. Sebert, Mybs, Pujula, Andelhof, Hodler, Warden, Rollet de l'Isle, Reed, Bourlet, Kandt, Cart, Perogordo, Schmidt, Höveller, Michaux, Von Frenckel.

La komisionoj kunvenis pli malfrue en la semajno por provizora organizado, kaj nomis subkomitaton por pretigi, antaŭ la unua de januaro, 1912, eksperimentan skizon, kiun tiam la tuta komisiono povos konsideri. La komisionoj ĝoje akceptos sugestiojn pri siaj laboroj, ĝis la unua de decembro, 1911, la lasta dato por ricevi ilin.

DONACO DE STANDARDO.

Jus antaŭ la formala finiĝo de la agada

THIRD GENERAL MEETING.

For the third time the "delegate body," as it had been originally called, gathered for a business session on Thursday morning, with Mr. Mudie of England, and later Dr. Mybs of Germany in the chair. After some discussion of various proposals, the following resolution, proposed in its final form by Prof. C. Bourlet, editor of *La Revuo*, was adopted:

The organized delegates of the Esperanto propoganda societies convinced that it is desirable (1) to organize on a firm and official basis the Permanent Committee of Congress, the Language Committee, the International Financial Council, the Central Office and its official organ; (2) to unite more closely the Esperantist societies; (3) to establish effective relations among the propoganda societies, the specialist societies, and the U. E. A.;

Decide to establish a commission which shall study this whole problem and devise a definite plan to present to the consideration of the delegates of the Eighth Congress in 1912, such plan to be printed in the *Oficiala Gaseto* three months previous to the Congress.

The meeting then proceeded to the selection of members of this commission, and after considerable discussion succeeded in forming a list, which seemed entirely satisfactory to the whole assembly, organizing skill, executive ability, and general familiarity with Esperanto work being the qualities especially desired for this important work. The following were elected: Messrs. Sebert, Mybs, Pujula, Andelhof, Hoveller, Rollet de l'Isle, Reed, Bourlet, Kandt, Cart, Perogordo, Schmidt, Hodler, Michaux, Von Frenckel.

The members of the commission met later in the week for preliminary organization, and appointed a sub-committee to prepare a tentative outline of the work, such outline to be ready for consideration by the entire committee by Jan. 1, 1912. The latest date at which the commission can receive suggestions on its work (which suggestions from Esperantists of experience will be welcome) is Dec. 1, 1911.

PRESENTATION OF FLAG.

A pleasant incident just before the

kunveno, okazis agrabla ceremonio, nome, la donacado al D-ro Zamenhof de silka esperanta standardo, farita de esperantistaj blinduloj en Wasingtono, anoj de la Kapitola Klubo, kiuj ameme faris ĉi tiun emblemon dum siaj kunvenoj la pasirtan jaron. Tio surprizis ĉiujn, escepte de S-ro. Edwin C. Reed, kiu aranĝis oportunan okazon kaj havigis la lokon sur la programo, kaj D-ro W. J. R. Thönssen el Wasingtono, kiu faris la donacparoladon pro la klubo. D-ro Zamenhof tre afable akceptis la standardon, kortuŝite de tiu signo de ama estimo de senigitaj homoj, al kiuj Esperanto, kvankam ĝi ne povas redoni la vidpovon, almenaŭ povas ebligi je treege pli granda mezuro eniron en la mondon de kulturo.

KONCERTO, PAROLADO, DEKLAMOJ.

Jaŭdon posttagmeze speciale interesa programo estis prezentita en la Operdomo, al granda kaj aprobanta aŭdantaro. La muzikan parton prezentis blindaj esperantistoj el diversaj nacioj. Ilia bonega interpretado de muzikaj, kaj voĉaj kaj instrumentaj, ricevis plenan estimon kaj ĉiu muzikisto estis revokata al la estrado por ree kanti aŭ ludi. Estis neor-

dinare kortuŝante aŭdi tiujn nevidantajn esperantistojn,—kiujn oni devis gvidi al kaj for de iliaj lokoj sur la estrado,— kaj rimarki la profundan fervoron de ilia entuziasmo pri la lingvo kiu malrapide estas malfermanta al ili la pordojn de mond-literaturo kaj persona amikeco, ĝis nun preskaŭ tute ŝlositajn. La blindaj muzikistoj kiuj partoprenis la programon estis S-roj A. D. Grieve kaj C. A. Mackay el Montrose, Skotlando, F-ino A. Melchior el Kopenhago, Danujo, S-ro J. S. Brand el Dundee, Skot-

lando. La muzika programo agrable diversigis per du deklamoj, unu pri Samsono kaj Delila, kiun prezentis S-ino Elb el Dresdeno, mem tradukinte ĝin por ĉi tiu okazo, la alia, humora monologo verkita de D-ro Van der Biest, prezentata

formal adjournment of the business meeting was the presentation to Dr. Zamenhof of a silk Esperanto flag, made by blind Esperantists of Washington, members of "La Kapitola Klubo," who had lovingly wrought this emblem during their meetings the past year. It was a surprise to all except Mr. Edwin C. Reed, who had arranged the time and opportunity and secured the place upon the program, and Dr. W. J. R. Thonssen of Washington, who made the speech of presentation in behalf of the club. Dr. Zamenhof accepted the flag most cordially, greatly touched by this mark of loving appreciation from those to whom Esperanto can give, if not the lost sight, at least the opportunity of entering infinitely more of that cultured world to which Esperanto alone seems able to open the door.

CONCERT, LECTURE, RECITATIONS.

On Thursday afternoon a program of an especially interesting character was presented in the Opera House, to a large and appreciative audience. The musical portion of the entertainment was presented wholly by blind Esperantists of various nationalities. Their excellent rendition of both vocal and instrumental music was fully appreciated, and each of the musicians was called back to the stage to respond to the request for encore.

It was peculiarly touching to hear these sightless esperantists, who had to be guided to their places on the stage and off again, and to note the deep fervor of their enthusiasm for the language which is slowly setting ajar for them the door to a wealth of literature and personal friendship which until recently was almost wholly barred. The blind musicians who took part in the program were Mr. A. D. Grieve and Mr. C. A. Mackay of Montrose, Scotland, Miss A. Melchior, of Copenhagen, Denmark, Mr. J. S. Brand, of Dundee, Scotland.

The musical program was pleasantly varied by two recitations, one a version of Samson and Delilah, given by Mrs. Elb, of Dresden, who had herself made the translation for this occasion, the other a humorous monologue written by

de F-ino I. Vermeuden el Antverpeno.

Alia interesajo de la programo estis parolado de S-ro Privat el Genevo, pri "Esperanta Literaturo." Parolante en flua kaj elokventa Esperanto, S-ro Privat atentigis la aŭdantaron pri la rimarkinda beleco kaj vivemeco de la lingvo, kaj emfaze insistis pri la fakto ke ĝi estas, pro sia forto kaj fleksebleco, vere vivanta lingvo, malpli artefarita, laŭ iuj faktoj, ol la tute "naturaj" lingvoj. La

programo finiĝis per raporto pri la literatura konkurso de la kongreso, kaj oni alvokis al la estrado, por ricevi la premiojn, la esperantistojn kiuj sukcesis gajni ilin. La kurteno tiam malleviĝis, kaj pro tio la disdonado de premioj, okazinte ekster vido de la eliranta aŭdantaro, estis tute ne ceremonia kaj ne bezonas specialan priskribon. Multaj premioj estis donacitaj por esperantaj originalaĵoj pri diversaj temoj; sed, ĉar la juĝado pri ĉiuj ankoraŭ ne estis finita kiam okazis la kunveno, la nuna eldono de neplena listo ne ŝajnas konsilinda al AMERIKA ESPERANTISTO.

PAROLADOJ PRI AERVETURADO.

Interesa afero de la vespero jaŭdon, la 24an de Aŭgusto, estis parolado en salono de la reĝa ateneo, pri "Esperanto kaj Aerveturado" farita kune de Sroj. Ernest Archdeacon kaj Karlo Bourlet. Sro. Archdeacon, unu el la plej fruaj kaj famaj flugistoj, klarigis kiel Esperanto helpas al disvolviĝon de la flugarto, faciligante interkomunikiĝon inter diversaciaj birdhomoj; kaj komparis la progreson de la lingvo al la kreskado de la flugarto mem,—unue malrapida kaj necerta, nun rapide disvolviĝanta kaj antaŭeniranta por esti grava ero en la nuntempa mondvido.

Fine li anoncis ke li donacos al la Societo Esperantista Franca 20,000 frankojn (okmil spesmilojn) por disdoni intergiaj klasoj kiel premiojn. Tiun novaĵon oni tre entuziasme ricevis.

Sro. Bourlet sekvante lin resumis interesege la historion de homflugado,

Dr. Van der Biest, and rendered by Miss I. Vermeulen, of Antwerp.

Another interesting feature on the program was a lecture on "The Esperanto Literature," by Mr. Privat, of Geneva. In this address, delivered in ready and eloquent Esperanto, the speaker called attention to the great beauty and vitality of Esperanto, and emphasized the fact that this vigorous and flexible language is a truly living tongue, less artificial in some ways than even those wholly "natural" national languages.

At the close of the program a report concerning the Literary Contest held in connection with the congress was presented, and those esperantists who had won premiums were requested to go upon the stage to receive them. The curtain was then lowered, so that the presentation of premiums, which took place out of view of the departing audience, was a purely informal affair, and needs no special mention. (A large number of premiums were given for original writings in Esperanto on various subjects, but as the judging of all had not yet been completed when the Congress took place, the publication of a partial list at this time is not deemed advisable in AMERIKA ESPERANTISTO.)

LECTURES ON AVIATION.

An interesting event of the evening of Aug. 24th was the lecture, in the hall of Royal Athenaeum, upon "Esperanto and Aviation," given jointly by Mr. Ernest Archdeacon and Carlo Bourlet. M. Archdeacon, one of the earliest and most famous aviators, touched upon the service rendered by Esperanto in the development of aviation, through promoting intercourse among the birdmen of different nationalities and compared the progress of the language to the growth of the flying art itself—first by slow and uncertain steps, but now rapidly developing and becoming an important factor in the life of our time. In closing, he announced that he was about to present to the *Société Esperantiste Française* the sum of 20,000 frs., to be distributed among its classes in the form of prizes, a statement which was received with much enthusiasm.

M. Bourlet followed with a most interesting resumé of the history of flying,

skizante ĝian disvolviĝon, kaj al la gvidebla direktebla balono kaj al la aeroplano; li ankaŭ klarigis la konstruadon de la aeroplano kaj la diversajn rimedojn eltrovitajn por kontroli kaj manregi ĝian iradon tra la aero. Eltiritaj el profunda studado de la meĥanikaj principoj de flugado, liaj vortoj estis ricevataj kiel aŭtoritataj, kaj la aŭdantaro atente aŭskultis. La paroladon oni ilustris per movbildoj kiuj prezentis konatajn flugistojn kaj diversajn tipojn de aeroplanoj.

Ĉar multaj deziris ĝin aŭdi, la parolado okazis dufoje dum la sama vespero, je la sepa kaj duono, kaj je la deka; kaj ambaŭ prezentoj havis plenan aŭdantaron.

EKSKURSO SUR LA SKELDO.

Vendredon matene oni pasigis en komitataj kunvenoj, vizitado, kaj aĉetado, ĉu sola, ĉu en esperantistaj grupoj pli-malpli internaciaj, inter kiuj ĉiu momento estis uzata por interparoladi kaj por konatiĝi kun novaj amikoj el ankoraŭ pluaj landoj.

Sed la programo enhavis nenion ĝeneralan ĝis posttagmezo, por kiu estis aranĝita ekskurso sur la rivero skeldo. Je la dua la esperantistoj komencis kuniĝi ĉe la rendevuo, por promeni kune tra la urbo al la doko kie atendis la vaporŝipoj. Ankoraŭ ili alvenis, ankoraŭ pli multaj ol antaŭe, kaj kiam la kaleŝo aperis kun Dro. kaj S-ino. Zamenhof, tiel granda fariĝis la entuziasmo de la gaja amaso ke junularo tuj malligis la ĉevalojn for de la kaleŝo kaj forsendis ilin kiel tute nebezonaĵn. Aliaj venis, samintencaj, kaj baldaŭ la parado ekmoviĝis tra la stratoj, tirante la kaleŝon kun la gajeco de vera entuziasmulo, flirtigante standardojn kaj gaje babilante. Dro. kaj S-ino. Zamenhof aŭfable akceptis la salutesprimon tiamaniere donitan, dum la Antverpenanoj kuniĝis sur la trotuaroj kaj apud la fenestroj por rigardi kun videbla interesa tian paradon, kia neniam antaŭe trapasis la stratojn de tiu antikva urbo.

Tri vaporŝipoj, flirtigante la Esperanton standardon, venis unu post alia al

outlining its progress both in the direction of the dirigible balloon and the aeroplane, explaining in the course of his remarks, the construction of the aeroplane, and the various devices for controlling and regulating its progress through the air. Having given much study to the mechanical principles of flight, his words were received as authoritative, and were followed by the audience with close attention.

The lecture was illustrated by a series of moving pictures, presenting prominent aviators and the various types of aeroplanes.

Owing to the number in attendance, the lecture was given twice during the evening, at 7.30 and 10 o'clock, the hall being well filled on both occasions.

EXCURSION ON THE SCHELDT.

Friday morning was occupied with sectional meetings, committees, etc., with sightseeing, shopping alone or in more or less international groups of esperantists, who seized every moment to converse with each other and make new friends from still more countries, but the program contained nothing of a general nature until afternoon, when an excursion on the river Scheldt was scheduled. At two o'clock the esperantists began to gather at the appointed rendezvous, to walk together through the city to the dock where the steamers were waiting. Still they came, in ever-increasing numbers, and when the carriage appeared with Dr. and Mr. Zamenhof, the enthusiasm of the merry throng was such that a group of young men promptly unhitched the horses from the carriage, and sent them away as utterly unnecessary. Others entered in the spirit of this, and soon the procession began to move along the streets, drawing the carriage along with the abandon of the true enthusiast, waving flags, and talking merrily, while Dr. and Mrs. Zamenhof graciously accepted the tribute thus offered, and the inhabitants of Antwerp congregated on the sidewalks and at windows, gazing with very definite interest at such a procession as never before had passed along the streets of this venerable city.

Three steamers, each flying the Esperanto flag, pulled up to the dock one by

la doko, kaj ĉiu ricevis plenan ŝarĝon da esperantistoj.

Eble ekskursantoj intertempe rigardis la malaltajn verdajn bordojn, kaj karakterizajn vidadojn de flandra markomercio, sekvatajn de paca pejzaĝo, sed efektive ni povas esti certaj ke tiuokaze agrable interparolado superis la plezurojn de rigardado. Ne ĉiutage en la jaro oni povas paroli esperante kun samideanoj el tridek landoj, trovi simpatiajn geamikojn inter homoj kies patra lingvo estas fremda al ni, kies viv-kutimoj kaj pensoj kredeble estas malsimilaj al la niaj.

Tial, la esperantistoj interparolis, duope, triope, en pli grandaj kaj ĉiam ŝanĝantaj grupoj; ili interŝanĝis ideojn, aŭtografojn, vizitkartojn, diskutis literaturajn kaj politikajn aferojn, tiel vigle kvazaŭ ĉiu parolis sian nacian lingvon, forgesante tiam ke eĉ ekzistas tiaj vortoj, kiaj "fremdulo" aŭ "alilandano." Kiel multaj agrablaj memoraroj pri tiu tago revenos dum la estontaj jaroj, ĉu tiuj internaciaj amikoj renkontigos la venontan jaron ĉe la oka kongreso, ĉu ili neniam poste revidos unu la alian! Usonano kiu diligente profitis la okazon ĉe tiu kongreso,—la unua kiun li ĉeestis,—diris ke li posedas aŭtografojn de kvincent novaj amikoj, kaŭze de sia semajno en Antverpeno. Aliaj havis vizitkartojn, fotografarojn kaj aŭtografojn kiuj pravas similajn amikecojn. Spertaj esperantistoj atestas ke tio ĉiam estas unu el la grandaj plezuroj de Esperantista kongreso.

KONGRESAJ AMIKECOJ.

Efektive, fari novajn amikojn estas parto de la mirindaj travivaĵoj ĉe esperantaj kongresoj. Kvankam tio ne ĉiam okazas, tamen personoj kiuj havas komunan intereson je Esperanto ofte povas trovi duan komunaĵon; kaj nur okaze komencita konatiĝo maturiĝas en daŭran kaj ĉarman amikecon, eĉ inter amikoj loĝantaj sur kontraŭaj flankoj de la tero. Rilate al "esperantistaj internaciaj edziĝoj", sufiĉas diri ke ili okazas, kaj estas inter la plej feliĉaj edziĝoj!

one, as the crowd arrived, and each was loaded to its full capacity with esperantists.

It may be that the excursionists at intervals looked at the low green shores, the characteristic view of Flemish shipping power followed by the peaceful fields, but, as a matter of fact, we may be sure that the delights of conversation outweighed the pleasures of sightseeing on this occasion. One does not have opportunity every day in the year to talk Esperanto with esperantists from thirty different countries, to find congenial friends among men and women whose mother-tongue is an alien one, whose mode of life and thought is presumably strange and "different."

Therefore, the esperantists talked, in twos and threes, in larger and constantly changing groups, exchanging ideas, autographs, and cards, discussing literary or political matters as energetically as if each person were speaking his national language, and forgetting for the time that such words as "foreigner" or "stranger" exist. How many pleasant memories of that day to be recalled throughout the years, whether these international friends meet again next year at the Eighth Congress, or whether they never see each other again! One of the Americans who made good use of his opportunities at the congress, the first he had ever attended, remarked that he had the autographs of five hundred new friends because of the week in Antwerp. The others had cards and photos and autographs indicating similar friendships, and esperantists of experience testify that this is always one of the great pleasures of an Esperanto Congress.

CONGRESS FRIENDSHIPS.

In fact, the finding of friends is one of the wonderful experiences at Esperanto Congresses. While this is by no means inevitable, yet persons who have Esperanto in common can frequently find a second common interest, and what begins as almost a casual acquaintance ripens into a lasting and delightful friendship, even though the two friends live on opposite sides of the earth. As for the "esperantist international weddings," suffice it to say that they do occur, and are among the very happiest matches.

En la eksteraj kafejoj, la vicoj da seĝoj kaj tabloj apud la hoteloj, kie la plezurama Belgo, simile al la Franco, sidas por ĝui glaciaĵon, aŭ trinki kafon aŭ alian refresigan trinkaĵon, grupoj da esperantistoj el ĉiuj nacioj estis ĉiam videblaj.

Afiŝetoj apud la akceptejoj, kovrite de proponoj pri rendezvoj por esperantistoj kiuj, korespondinte kun samideanoj alilandaj, nun deziras persone renkonti, mute sed elokvente atestis la potencon de Esperanto starigi internaciajn amikecojn

LA INTERNACIA BALO.

Unu el la plej agrablaj tute sociaj aferoj dum la kongresa semajno estas ĉiujare la internacia balo, vendredon vespere,—je la tago antaŭ la kongresa finiĝo. Dum pli fruaj tagoj, malnovaj amikecoj renoviĝis, kaj novaj multnombre fariĝis; tial la balo donas okazon por agrablega vespero, kiam esperanto per ekskluzive socia uzado estas ilo por grandega plezuro. La balo de la Sepa Kongreso okazis en la somerloĝejo de la Harmonia Klubo, kies grandaj salonoj kaj belaj ĝardenoj estis tre taŭga loko por tia festo. Bonega orkestro de pli ol cent instrumentoj faris la muzikon, kaj la dancantoj dancis kun plena gajeco, dum la nombro da rigardantoj kaj promenantoj tra la ĝardenoj estis egala aŭ eble pli granda. La kutimo de antaŭaj kongresbaloj, laŭ kiu oni portas tipan veston de sia patrujo, ne estis ĝenerale sekvata; tamen kelkaj interesaj kostumoj estis vidataj. Kelkaj Skotoj portis la ceremonian kilton, kaj unuj usonanoj la "stelajn kaj striojn", kiel skarpon trans la brusto aŭ alimaniere

aranĝitajn. Eble la plej interesaj estis la tre pitoreskaj vestaĵoj de Dro. Robin el Bukarest, redaktoro de DANUBO, kaj de Sino. Robin kaj iliaj ĝeifanoj. Tiuj du allogaj infanoj, kvinjara knabeto kaj sepjara knabino, ŝajne tiom ĝuis la kongreson kiom plenaĝuloj, kaj impresis ĉiujn konatojn per sia mirinde facila kaj korekta uzado de Esperanto,

In the outdoor cafés, the rows of chairs and tables in front of hotels, where the pleasure-loving Belgian, like the Frenchman, sits to sip an ice or drink coffee or partake of some other refreshing beverage, groups of esperantists from all nations were always to be seen, while a bulletin board near the "Akceptejo," covered with suggestions of rendezvous for esperantists, who had corresponded with esperantists of other nations and now wished to "meet in the flesh," gave mute but eloquent testimony of the power of Esperanto in forming international friendship.

THE INTERNATIONAL BALL.

One of the pleasantest purely social events of the Congress week is always the international ball on Friday evening, the day before the Congress formally closes. By this time, old friendships have been formed, and such an occurrence as a ball furnishes opportunity for a most delightful evening, when Esperanto in purely social use is a medium offering unalloyed pleasure. The ball in connection with the Seventh Congress was held in the summer quarters of the "Harmonie Club," whose large halls and beautiful gardens formed an excellent location for such an event. A fine band of over one hundred pieces furnished the music, and the dancers danced with joyous abandon, while the number of on-lookers and of those who strolled in the gardens and sat at the numerous tables for refreshments was as large or perhaps larger. The custom of wearing the typical garb of one's native country was not very generally followed on this occasion, although a few interesting costumes were noted. Several Scotchmen wore the full dress kilt, a number of Americans wore the stars and stripes in the form of a scarf across the breast, or otherwise arranged, etc. Most interesting were perhaps the elaborately picturesque Roumanian costumes of Dr. Robin of Bucharest, the editor of "Danubo," and of Mrs. Robin and their two children, a small boy and girl of about five and seven years of age, respectively, who by the way seemed to enjoy the whole congress as much as any of the grown-ups, and impressed all acquaintances with their wonderfully fluent and

kiu efektive estas al ili preskaŭ dua pa-
tra lingvo.

LA FINA KUNVENO.

La lasta ĝenerala kunsido de la kongreso okazis Sabaton matene. Kelkaj raportoj estis prezentataj, inter kiuj estis tiu de Lingva Komitato, legata de ĝia prezidanto, E. Boirac, rektoro de la Universitato de Dijon, ankaŭ raporto pri plua organizado de la Internacia Financa Konsilantaro, kreita en 1910, kaj raporto pri la oficistoj elektitaj de la Komisio antaŭe priskribita sur tiuj ĉi paĝoj,

La Kongreso voĉdonis dankojn al la reĝo kaj estraro de Belĝujo, al tiuj alilandaj registaroj kaj estraroj kiuj sendis oficialajn reprezentantojn, al lia urbestra moŝto de Londono, al la urbo Antverpeno kaj al la organiza komitato de la Sepa Kongreso.

OKA KONGRESO.

Oni voĉdonis ke la oka internacia kongreso de Esperanto kunvenu en Krakovio, antaŭe la ĉefurbo de antikva Polujo, kaj tiamaniere solenigu en la lando de ĝia naskiĝo la dudekkvinan datrevenon de la kreado de Esperanto. Oni plue voĉdonis ke la Kongreso de 1913 okazu en Genovo, kaj de 1914 ĉe Parizo. Por la kongreso de 1915, kaj San-Francisko kaj Edinboro estis proponitaj, sed oni ne voĉdonis.

Post kiam Sro. Van der Biest-Andelhof dankis la kongresanojn pro ilia helpo en sukcesigado de la kongreso, kaj esprimis esperon ke iliaj memoroj pri Antverpeno estu kiel eble plej agrablaj, la kunsido finiĝis kiam Fino. Maria Pose-naer (el la organiza komitato) prezentis al Dro. Zamenhof, pro la belga esperantistaro, pentraĵon pentritan de la belga artisto Emilo Stoffels. La temo de tiu bela pentraĵo estas la pitoreskaj dokaj de Antverpeno, ĉe kiuj montriĝas ŝipo portanta la simblon standardon de Esperanto. Post kiam Dro. Zamenhof esprimis sian estimon de tiu notinda donaco, la esperantistaro kune kantis "La Espero" lastatempe dum la Sepa Kon-

greso, kaj poste malrapide foriris el la salono, adiaŭante amikojn tie kaj ĉi tie,

correct use of Esperanto, which is practically a second mother-tongue for these attractive children.

THE CLOSING MEETING.

The last general session of the Congress took place Saturday morning. Several reports were presented, among them being that of the "Lingva Komitato," read by its president, Rector Boirac, of the University of Dijon, and the report concerning the further organization of the International Financial Council, created in 1910, and of the officers chosen for the Commission (mentioned earlier in these pages).

The Congress voted formal thanks to the king and to the Belgian government, to those foreign governments which sent official representatives, to the Lord Mayor of London, to the city of Antwerp, and to the organizing committee of the 7th Congress.

EIGHTH CONGRESS.

It was voted that the Eighth International Esperanto Congress should be held in Cracow, once capital of ancient Poland, thus celebrating the 25th anniversary of the creation of Esperanto in the native land of the author of Esperanto. It was further voted to hold the Congress of 1913 in Genoa, and of 1914 in Paris. For 1915 both San Francisco and Edinburgh were proposed, but no vote was taken.

After Dr. Van der Biest-Andelhof had thanked the Congress members for their assistance in making the Congress a success, and expressed his hope that their memories of Antwerp would be the pleasantest possible, the session ended with the presentation to Dr. Zamenhof, by Miss Maria Posenaer, of the organizing committee, on behalf of the Belgian Esperantists, of a painting by the Belgian artist Emile Stoffels. The subject of this handsome painting was the picturesque docks of Antwerp, in the foreground of which appeared a ship bearing the symbolic flag of Esperanto. After Dr. Zamenhof had expressed his appreciation of this unique gift, the esperantists joined in singing "La Espero," for the last time during the Seventh Congress, and then moved slowly from the hall, saying farewell to friends here and there, with always the clause added by

ĉiam kun la frazero "Ĝis Krakovio", aldonita de unu aŭ la alia. Samtempe oni rapide uzis fotografilojn, por lastaj bildoj de Dro. Zamenhof, de konataj esperantistoj, de grupetoj, dum Esperantistaj standardoj flirtis je la fundo.

POSTKONGRESAJ OKAZINTAĴOJ.

Du horojn post la fina kunveno de la ĝenerala Kongreso okazis la malferma kunveno de la Universala Esperanta Asocio, granda organizaĵo kies anaro multnombre estis reprezentata inter la anoj de la kongreso mem.

Tiu societo, kies prezidanto estas Sro. H. B. Mudie el Londono, kaj kies malferman kunsidon ĉestis Dro. Zamenhof, ne zorgas pri ia ajn propaganda laboro sed celas uzi esperanton en praktika vivo, kaj utiligi la servojn de esperantistoj en ĉiuj landoj por aliaj esperantistoj, en la komercaj aferoj, vojaĝado, k. t. p.

Aferoj pri la organizado kaj administrado de tiu granda kaj diversefika societo estis diskutataj, raportoj estis prezentataj, financaj faktoj estis anoncigitaj, novaj faktoj starigitaj, k. t. p., La finaj kunsidoj de la Asocio okazis lundon. Detalajn raportojn pri tiuj ĉi kunvenoj oni povas legi en la monata ĵurnalo "Esperanto," kiu estas la oficiala organo de la Universala Esperanta Asocio.

ESPERANTO KAJ LA RŪGA KRUCO.

Dimanĉon matene estis prezentata alte interesa montraĵo pri la granda utileco de Esperanto por la laboroj de la Ruĝa Kruco. La malfacilaĵoj pro la manko de lingva kompreno, kiuj malhelpigis la ruĝkrucajn laborantojn en la tempo de plej granda bezono, estis impresive konigitaj dum la Rus-japana milito kaj multaj aliaj okazoj.

Pro tio, kelkaj Ruĝkrucaj administrantoj faris agemajn penojn por enmeti Esperanton kiel postuladon de la servo, kaj esperanta literaturo speciale taŭga por tiu uzo jam estas akirebla.

Por la Antverpena montraĵo oni aranĝis tendojn, ambulancan servon, k. t. p. en la Placo Sankta Johano, kaj kelkaj memvolaj "vunditaj soldatoj" estis pretaj por ludi tian rolon en la prezentado. Je la deknua la kuracistoj,

one or the other, "Farewell till Cracow," while the kodaks everywhere were in good use, in getting final pictures of Dr. Zamenhof, of various well-known esperantists and of groups of friends, as Esperanto flags waved in the background.

POST-KONGRESS EVENTS.

Two hours after the closing meeting of the general Congress, the opening meeting was held of the U. E. A., a large and important organization whose membership was well represented among the members of the general congress.

This organization, whose president is Mr. H. B. Mudie, of London, and at whose first session Dr. Zamenhof was present, does not attempt to do any propaganda work, but seeks to make use of Esperanto in practical life, and to make the services of esperantists in all countries accessible to other esperantists in commercial dealings, travel, etc. Matters of organization and administration of this large and many-sided body were discussed, reports presented, financial records announced, new "sections" were established, etc., the final sessions of the Association being held on Monday. Detailed reports of these meetings will appear in the monthly journal, "Esperanto," which is the official organ of the U. E. A.

ESPERANTO AND THE RED CROSS.

Sunday morning a highly interesting exhibition was given of the great utility of Esperanto in the work of the Red Cross. The difficulties due to lack of linguistic intercomprehension, which are liable to render Red Cross workers helpless at times of greatest need, on the battlefield of nations of alien languages, were strikingly shown during the Russo-Japanese war, as well as on many other occasions. For this reason active efforts have been made by Red Cross workers to have Esperanto introduced as a requirement in the service, and Esperanto literature especially for such use is already obtainable.

For the Antwerp demonstration, tents, ambulances service, etc., had been arranged in the Place St. John, and a number of volunteer "wounded soldiers" were ready to play their part in the exhibition. At eleven o'clock the doctors,

helpantoj, k. t. p., aperis, direktitaj de Dro. Noel el la ruĝkruca kuracistaro ĉe Parizo, Dro. Broeckaert el Antverpeno, kaj ruĝkrucaĵoj el Antverpeno kaj du aliaj urboj. Tiuj pasis de unu soldato al alia, ekzamenante vundojn, ricevante petojn de la "vunditoj," donante ordonojn, k. t. p.

Cio estis farata en Esperanto kun granda rapideco kaj akurateco, kaj la metodo por komuniki rapide kun neesperantistaj soldatoj kaj ruĝkrucaĵoj, kaj ankaŭ kun spertuloj de la lingvo, estis efektive montrata. La usona fako de la ruĝa kruco estis oficiale reprezentata ĉe la Kongreso de Dro. H. W. Yemans, el la Usona Kuracista Rezervarmeo.

POSTKONGRESAJ VOJAĜOJ.

Post kiam la kongresa semajno finiĝis, multaj kongresanoj partoprenis diversajn interesajn postkongresajn vojaĝojn. El tiuj la du plej interesaj al amerikanoj estis la vojaĝo de la Internacia Scienca Asocio kaj la vojaĝo de la "Nordamerika Karavano." Mallongajn priskribojn pri tiuj du vojaĝoj, montrantajn la utilon de Esperanto dum vojaĝado, oni donos en la novembra numero de AMERIKA ESPERANTISTO.

aides, etc., appeared, directed by Dr. Noel, of the staff at Paris, Dr. Broeckaert, of Antwerp, and Red Cross members of Antwerp and two other cities. These passed from one to another of the soldiers, examining wounds, receiving requests from the "wounded," giving directions, etc., all being carried on in Esperanto with great speed and accuracy, the method of communicating quickly with non-esperantist soldiers and Red Cross workers, as well as with those proficient in the language, being effectively demonstrated. The United States branch of the Red Cross was officially represented at Antwerp by Dr. H. W. Yemans, of the U. S. Medical Reserve Corps.

POST-CONGRESS TRIPS.

After the congress week has ended, many of the congress members participated in various interesting post-congress trips. Of these the two most interesting to Americans were the trip of the International Scientific Association and the trip of the "Nordamerika Karavano." * * * Short descriptions of these two trips, showing the benefit of Esperanto in travel, will be given in the November number of AMERIKA ESPERANTISTO.

La Parolado de Dro. Zamenhof

RIEL tradicia malfermanto de la kongresoj esperantistaj, mi permesas al mi esprimi en la nomo de ĉiuj kongresanoj nian respektan kaj sinceran dankon al lia reĝa moŝto la reĝo Alberto pro la granda honoro, kiun li faris al nia afero, prenante sur sin la protektantecon super nia kongreso. Mi esperas, ke mi esprimos la deziron de ĉiuj kongresanoj, se mi proponos, ke ni sendu telegrafe nian diversgentan saluton al la regnestro de la lando, kies gastoj ni estas, kaj nian dankon al nia alta protektanto. Mi esprimas ankaŭ en la nomo de la kongresanoj nian koran dankon al la urbestro de Antverpeno, kiu afable donis al ni sian helpon kaj moralan apogon. Fine mi esprimas nian koran fratan dankon al tiuj niaj belgaj sami-

deanoj, kiuj tiel laboreme kaj zorge pretigis nian grandan feston.

Mi uzas ankaŭ la okazon de nia festo, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegajn meritojn en nia afero. La prelado JOHANN MARTIN SCHLEYER, kies nomon ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük. antaŭ nelonge festis la okdekjaran datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia nuna ĝenerala kunestado por esprimi al li tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni ankaŭ revis pri lingvo internacia, oni provis labori por ĝi; sed tio estis nur teoriaj skizoj, palaj senkorpaj fantomoj en la regiono de revoj. Li estis la unua, kiu diris al si: por lingvo internacia mi volas

ne revi, sed *labori*; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan *movadon*. Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis *per si mem* en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas al kutimiĝi, kaj kio hieraŭ ŝajnis sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela; per longa kaj multespeca uzado eĉ la plej sovaĝa idiomo de la plej barbara gento iom post iom fariĝas riĉa, eleganta kaj oportuna lingvo.

Volapük pereis ĉefe pro *unu* grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: *absoluta manko de natura evolucio*; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus *tiu* eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis, Volapük neniam pereus kaj ni ĉiuj nun verŝajne parolus volapüke. Sed tiu bedaŭrinda eraro, kiun kaŭzis ne manko de talento kaj de laboremece, sed nur tro rapida publikigo de la lingvo, sen sufiĉe matura elprovado, —tiu eraro, kiu pereigis Volapükon, neniel malgrandigas la meritojn de ĝia aŭtoro, kiu la unua potence skuis la mondon por nia ideo; la grandaj meritoj de Schleyer en la internacilingva historio neniam malaperos.

Mi proponas al vi, ke okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta esperantistaro nian koran gratulon, nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos.

Karaj amikoj! Mi staras hodiaŭ antaŭ vi ne esperinte. Ĉar dum la lasta tempo la stato de mia sano estis tro malbona, mi decidis ne veturi al la kongreso en ĉi tiu jaro. Tamen en la lasta momento mi devis ŝanĝi mian decidon, ĉar mi rimarkis, ke la projekto, kiun mi prezentis por diskutado dum la sepa kongreso, ne de ĉiuj estas ĝuste komprenita kaj eble bezonas klarigojn de mia flanko. Tial

ne miru, ke mi ne prepariĝis paroli antaŭ vi pri ia speciala temo, sed mi tuŝos nur per nemultaj vortoj tiun demandon, kies pridiskutadon dum la kongreso mi proponis al vi. Mi ne antaŭvenos vian decidon por aŭ kontraŭ la diskutota projekto, mi volas nur diri kelkajn ĝeneralajn vortojn, por instigi vin bone kaj senpartie prepariĝi por la venontaj diskutoj.

Ekzistas en nia afero demandoj, kiuj povas esti solvataj ne de iu aparta persono, ne de iu aparta nacia asocio, ne de iu aparta institucio, sed nur de la tuta esperantistaro; ekzemple la demandoj pri nia Lingva Komitato, Konstanta Kongresa Komitato, k. t. p. Se iu volas fari simple konsilajn proponojn pri la interna agado de tiuj institucioj, li povas prezenti siajn proponojn al la estroj de la diritaj institucioj; sed se oni faras plendojn, se oni postulas reorganizon, anstataŭigon aŭ eĉ forigon de tiuj institucioj,—tiam al kiu oni devas sin turni? Aŭ se aperas iaj demandoj, kiuj koncernas la tutan esperantistaron, sed apartenas nek al la Lingva Komitato, nek al la Komitato de la Kongresoj,—tiam kiu havas la rajton ilin solvi? En sia privata esperantista vivo ĉiu persono aŭ grupo aŭ asocio estas kompreneble tute liberaj kaj povas agi, kiel ili volas kaj povoscias; sed pri ĉiuj demandoj, duboj aŭ entreprenoj, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, estas nepre necese, ke ni havu la eblon ĉiam scii la veran opinion aŭ deziron de la tuta esperantistaro. Esperanto ne estas ankoraŭ en tia feliĉa stato, ke ĉiu povu nur tiri el ĝi profiton, ne zorgante pri la bonstato de la afero mem: ni devas kaj dum longa tempo ankoraŭ devos propagandi ĝin, kreskigi ĝin, defendi ĝin kontraŭ malamikoj; sed se ni ne havas la eblon regule interkonsiliĝadi, aŭ se niaj interkonsiliĝoj, farataj ne en orda parlamenta maniero, ne havos moralan valoron por la esperantistoj, ni similos organismon sen kapo kaj sen manoj, ni nenion povos entrepreni, ni staros senmove kaj malpacos inter ni mem.

Mi ne volas en la nuna momento defendi la projekton, pri kiu vi en la plej proksimaj tagoj diskutos; tre povas esti, ke la projekto havas gravajn erarojn, kiujn via pridiskutado forigos; tre povas esti, ke la tuta projekto montriĝos neak-

ceptinda, kaj tiam—vi scias tion tre bone—mi ne penas altrudi ĝin al vi, kiel mi neniam ion al vi altrudis. Nur pri unu afero mi kore vin petas: kion ajn vi decidos,—ni ne fermu nian kongreson antaŭ ol ni en tia aŭ alia formo faros ian aranĝon, kiu donos al ni la eblon almenaŭ unu fojon en jaro solvi ĉiujn kolektiĝintajn disputojn aŭ dubojn en lojala interkonsento kaj konforme al la vera deziro de la tuta esperantistaro.

La aranĝo de regula kaj rajtigita kongresa voĉdonado, kiun mi proponis al vi, aŭ ia alia simila aranĝo, kiu eble rezultos el via diskutado, ne estos ia nova institucio kaj per si mem ne ŝanĝos la iradon de nia afero; sed ĝi donos al ni la forton de ordo kaj de solidareco. La institucioj, kiujn ni kreis, aŭ eble ankoraŭ kreos, ĉesos havi la karakteron de ia privataĵo kiun neniu subtenas kaj multaj atakas. Ili havos rajton diri al la esperantistaro: se ni estas bonaj, respektu

nin kaj subtenu nin; se ni estas malbonaj, reorganizu nin aŭ forigu nin. Ĉiu esperantisto scios, al kiu plej alta instanco li devas sin turni, se tio aŭ alia en la komun-esperantistaj aferoj ne plaĉas al li, kaj oni ĉesos konstante sin turnadi al mi, kiu hodiaŭ vivas, morgaŭ povas ne vivi, kaj kiu cetere havas nek rajton nek deziron solvi ĉiujn disputojn propra-decide.

Ni komencu nian feston kaj ankaŭ niajn laborojn, al kiuj ni dediĉu nian plenan atenton kaj senpartiecon. Se el niaj laboroj rezultos la enkonduko de preciza ordo en nian aferon, tiam la kongreso Antverpena estos unu el la plej gravaj inter niaj kongresoj. Tion ni esperu. Ĉiu el ni havu la firman decidon helpi per ĉiuj fortoj al la enkonduko de ordo kaj forigo de ĉiu malpaco en nia afero. Kun tiu firma kaj solena decido en la koro ni krii: vivu, kresku kaj floru nia afero!

Aldono al la Regularo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto

ĈIU decido de Internacia Esperantista Kongreso estas deviga nur por la komunaj Esperantistaj Institucioj *oficialaj*, tio estas por tiuj, kiuj estas kreitaj kaj subtenataj laŭ la deziro de Internaciaj Esperantistaj Kongresoj aŭ de la decido de la Delegitaro Rajtigita. Por la Esperantistoj *privataj* ĝi havas valoron nur moralan, montrante al ili la deziron aŭ opinion de la plimulto.

Partopreni en la Kongreso kaj en ĝiaj diskutoj havas la rajton ĉiu, kiu pagis la kotizon kaj submetiĝas al la kongresa Regularo; sed rajton de voĉdonado havas nur la regule elektitaj delegitoj de Esperantistaj grupoj aŭ societoj.

Kiel delegito estas rigardata ĉiu persono, kiu prezentas al la Kongresa Komitato rajtigan leteron, kiun, en la nomo de la grupo aŭ societo, subskribis ĝia prezidanto donante samtempe la nombron de anoj de la grupo aŭ societo.

Ĉiu loka, regiona kaj landa grupo aŭ societo povas elekti po unu delegito por dudek kvin anoj. Malgrandaj grupoj povas, por elekto de delegito, kunigi kun

aliaj grupoj.

Ĉiu grupo povas elekti siajn delegitojn aŭ inter siaj propraj membroj, aŭ inter aliaj esperantistoj, kiuj partoprenos en la Kongreso. Ĉiu delegito havas tiom da voĉoj, kiomfoje po 25 anoj havas la grupoj aŭ societoj, kiujn li reprezentas.

La tagordon de la Kongreso fiksas la Prezidanto de la Konstanta Kongresa Komitato post interkonsiliĝo kun la aliaj anoj de tiu komitato, kaj li publikigas ĝin tri monatojn antaŭ la Kongreso en la *Oficiala Gazeto*, por ke ĉiuj societoj kaj grupoj havu eblon esprimi al siaj delegitoj sian opinion pri la diskutotaj demandoj.

Se ia propono ne estas akceptita en la tagordo, ĝia aŭtoro povas ricevi de la Kongresa Estraro rajton disdoni ĝin dum la Kongreso, kaj se ne malpli ol 100 delegitoj subskribas ĝin kiel diskutindan, la Kongresa Komitato devas enporti ĝin en la tagordon.

En ĉiu grupo aŭ societo estas konsiderata kiel elektanta membro de grupo aŭ societo ĉiu, kiu pagis jaran kotizon al la Administra Komisio.

Some Congress Facts

OFFICIAL DELEGATES.

The following governments and non-esperanto organizations sent official delegates to the Seventh Esperanto Congress in Antwerp:

Belgium, represented by Mr. Goemans, general inspector of intermediate instruction.

Brazil, Agenor Augusto de Miranda, engineer of telegraphs.

Chile, Dr. Fraga.

Guatemala, Mr. Marsily, consul at Antwerp.

China, Koey Ping Young, secretary of the Chinese legation in Brussels.

Spain, Captain Josefo Perogordo.

Hungary, Aleksandro Giesswein.

Nicaragua, consul at Antwerp.

Norway, Linar Schibbye.

Persia (name not obtained).

Rumania, the Ministry of Agriculture and Real Estate, represented by Mr. Fischer, who also represented the *Chambers of Commerce of Bukarest and Galatza*.

Russia, the Ministry of Commerce and Industry, by Mr. Nedavišin.

United States of America, Mr. Edwin C. Reed, who also represented the *Washington Chamber of Commerce*.

War Department, U. S. A., Dr. H. W. Yemans, who also represented the *American Red Cross Society*.

Bureau of Standards, Dept. of Commerce and Labor, U. S. A., Mr. E. C. McKelvy.

State of Massachusetts, Mr. Winthrop Lee.

State of North Carolina, Dr. Abraham Rudy.

State of Pennsylvania (by special act of the legislature), Mr. J. D. Hailman.

State of Vermont, Mr. John L. Stanyan.

City Government of Praha, Austria, Jan Biskup, city councilor.

International Institute of Bibliography, Mr. Paul Otlet.

Touring Club of France, Mr. Gabriel.

French Society of Arbitration among Nations, Mr. Ch. Richet.

International Association of Peace and Arbitration (London), Mr. F. Moscheles.

AMERICANS AT THE CONGRESS.

The following is a partial list of those from North America present at the Congress in Antwerp. It was reported that forty-two members of the Esperanto Association of North America were registered, some of them registering during the last few days and therefore not included in the published list of congress members. The following were known to be present:

Edwin C. Reed, official representative of the United States of America (also representing the Washington Chamber of Commerce).

Dr. H. W. Yemans, official representative of the U. S. War Department, also of the Red Cross Society.

E. C. McKelvy, official representative of the U. S. Bureau of Standards (Department of Commerce and Labor).

J. D. Hailman, representing the State of Pennsylvania (by legislative enactment).

G. W. Lee, with credentials from the Governor of Massachusetts.

J. L. Stanyan, with credentials from the Governor of Vermont.

Abraham Rudy, with credentials from the Governor of North Carolina.

Dr. Ivy Kellerman-Reed, Editor of *Amerika Esperantisto*.

H. S. Hall, Councilor of the Ohio Valley Division, Esperanto Association of North America.

J. M. Geldert, Councilor of the Canadian Division, Esperanto Association of North America.

J. F. Morton, Jr., Councilor of the New York Division, Esperanto Association of North America.

Herbert Harris, Portland, Me.

Dr. D. W. Fellows, Portland, Me.

Miss Julia May Leach, Amherst, Mass.

Dr. John Groman, Utica, N. Y.

Miss Cora L. Butler, Port Richmond, N. Y.

Albert Janssen, Brooklyn, N. Y.

Miss Janssen, Brooklyn, N. Y.

Jos. Silbernik, New York, N. Y.

Miss L. F. Stoeppler, New York, N. Y.

Dr. H. B. Besemer, Ithaca, N. Y.

Mrs. H. B. Besemer, Ithaca, N. Y.

John D. Collins, Ithaca, N. Y.
 Miss Delia C. Condron, Washington,
 D. C.
 Clifton R. Linfoot, Washington, D. C.
 Dr. W. J. R. Thonssen, Washington,
 D. C.
 Miss Belle C. Saunders, Washington,
 D. C.
 Miss Julia H. Hoffman, Washington,
 D. C.
 Miss E. W. Weems, Baltimore, Md.
 Mrs. A. Rudy, Raleigh, N. C.
 Miss Ann E. Beattie, Cardington, O.
 Mrs. H. W. Yemans, Detroit, Mich.
 Dr. B. F. Simonek, Chicago, Ill.
 Mrs. B. F. Simoneek, Chicago, Ill.
 Edwin L. Clarke, Canon City, Col.
 D. E. Parrish, Los Angeles, Calif.
 H. I. Keyes, Uniontown, Pa.

ITEMS.

At the time of opening of the Congress there were 1722 members enrolled. Even until the last days of the convention others enrolled, and while the exact figures of the final enrollment are not at hand, it is safe to state that the membership was considerably over 1800.

At the opening meeting the speakers representing the Esperantists of different nations and languages numbered thirty-two.

The *Konstanta Komitato de la Kongresoj* for the coming year was chosen as follows:

Honorary Presidents: Dr. Zamenhof and Prof. Boirac.

President: General Sebert of Paris.

Vice President: Prof. Carlo Bourlet of Paris.

General Secretary: Gabriel Chavet of Paris.

Curators of the Congress Treasury: Dr. Mybs of Dresden and Mr. Mudie of London.

Other Members: Dr. Yemans and Edwin C. Reed of United States, and Messrs. Van der Biest and Van Schoor of Belgium.

As told in the story of the Congress, it was decided to create a Commission to bring in a plan for a general world federation. This Commission has appointed a sub-commission to classify all suggestions, and all suggestions must be sent to this sub-commission in Germany before December first. The American member of the general commission is Edwin C. Reed, who will be glad to receive and forward any suggestions.

CINEMATOGRAPH PICTURES.

One of the up-to-date moving picture theatres of Antwerp took photographs of the opening meeting of the Congress, also of other interesting occurrences, and displayed these to interested audiences of Esperantists and the general public during the Congress week. After that week the films were obtainable for general use, and the firm owning them (Pathé Bros.) are now showing the pictures everywhere. Americans should urge their best local moving picture theatres to obtain and use these films of the Seventh Congress, thus accomplishing the double purpose of seeing for themselves a few of the events of the Congress, and carrying out a new line of propaganda work. (A film costs \$5.00 and may be obtained at 41 West 25th St., N. Y.)

Concurrent Resolution

(This resolution passed by the Pennsylvania Legislature, in accordance with which Mr. J. D. Hailman of Pittsburgh, represented his state at the Esperanto Congress in Antwerp, should be carefully read by all who are planning legislative work concerning Esperanto during the coming year.)



HEREAS, The famous international language, Esperanto, intended to facilitate communication between people and races speaking dif-

ferent tongues, has been and is making vast strides throughout the world; and

Whereas, The Seventh International Congress of Esperantists will meet in Antwerp, Belgium, in August, one thou-

sand nine hundred and eleven; and

Whereas, The students and adherents of this language are working to bring about universal peace and a closer union among the races of the world; and

Whereas, Official representatives from many nations have attended these Congresses and will attend the coming one in Antwerp; and

Whereas, The United States Government has been and will be represented officially at these Congresses; and

Whereas, It is fitting that the Commonwealth of Pennsylvania should be officially represented at the Seventh Congress; therefore

Be it resolved by the Senate of the General Assembly of the Commonwealth of Pennsylvania (if the House of Representatives concur), that the Governor is hereby authorized and directed to appoint one male citizen of this Commonwealth, skilled in Esperanto, to represent this Commonwealth at the Seventh International Congress of Esperantists, to be held in the city of Antwerp, Belgium, in August, one thousand nine hundred and eleven. Such representative shall serve without compensation from or expense of any nature to this Commonwealth.

To Non-Esperantists

ESPERANTO, whose Seventh Annual International Congress has been described in this number of AMERIKA ESPERANTISTO, is by no means an untried experiment. Although only seven annual meetings have been held, the language was first published twenty-four years ago, in a brochure by Dr. Zamenhof of Warsaw, and since that day has steadily gained ground, until it is now fairly well established in every country of the world, and is definitely established in the chief countries of Europe. In this number of the magazine we have told some of the things done all in the one international auxiliary language, in a great meeting of delegates from thirty-two different countries and languages. In the next number we shall tell how advantageous it is to know Esperanto when traveling in foreign lands.

Esperanto is not intended to supplant any existing language. It is not a project for the establishment of a universal tongue, but it meant to fill that great desire for an international idiom, a language which all nations will learn after the mother-tongue, instead of merely obtaining a smattering of some one or more difficult foreign national languages which can be of benefit only in the one or more countries where such language is spoken.

Esperanto is many times easier to ac-

quire than is any national language. It is free from the difficult idioms which trouble the student; it is regular; and there are no exceptions to any of the few rules; it is pronounced exactly as it is spelled, for each letter always has the same sound, and each sound is always represented by the same letter; it has one easy conjugation for all verbs, so there are no irregular verbs.

Esperanto not only is intended for a medium of easy international communication for the man of commerce or science, or for the traveler, but its propagandists also believe that Esperanto has a mission even more important. Esperantists in all countries are making friends in other lands, for even though they may not travel it is a simple matter to obtain the addresses of esperantists in other parts of the world who have mutual interests. As Esperanto progresses and more and more people thus become acquainted with others in the far corners of the world, and learn that they also are truly "human," the contempt for the "foreigner" will become less and the spirit of international good-will is obviously bound to increase.

We therefore invite you who are not yet Esperantists to become members of this great world movement. Obtain a text-book and see how interesting the study is. Join THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, whose mem-

bership is open to any person interested in the movement. Subscribe for AMERIKA ESPERANTISTO which, in its regular numbers, contains news of the movement among the societies of this and other countries, a considerable amount of good literature in Esperanto for both the student and the proficient Esperantist, as

well as a special department for beginners. Year's subscription is \$1.00, with which we will give to new subscribers *for a limited time*, a free paper-covered copy of the the *American Esperanto Book*. Active membership in THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA is fifty cents a year.

To Esperantists

WITH the first of October a new year of activity begins. The importance of Esperanto here and abroad has been steadily increasing, thanks to the work you have been doing. The coming year is certain to be a most important one, a year in which, by *pulling together* for our common cause, much may be accomplished to establish more firmly the international language in the minds of the American people. First and foremost be sure to keep your name on the list of subscribers of the magazine and thus keep in touch with what others are doing, and at the same time assist to keep it alive and make it grow; for without such a magazine in America which you may point out to inquirers, Esperanto would not appear so strong as it is; patronize the book department of the American Esperantist Company in order that this, the one Esperanto publishing company in the country, may increase, and do more and more advertising and pushing of Esperanto publications; remember that any movement is reckoned, not at the estimated number of adherents, but by the actual enrolled membership of the official organization; therefore be sure to join or renew your membership in THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA. This is *tremendously* important this year because of the bill which has been introduced in the United States House of Representatives for an investigation of Esperanto. It is expected that this bill will come up for consideration in December, and the number of Esperantists

enrolled in the organization will have great weight. If you have not already done so, write your Congressman, asking him to consider carefully "House Resolution 220." Even if you have written once, write him again reminding him of this, about the first of December. Try to get publicity in your local papers. Take material from this number of AMERIKA ESPERANTISTO, mention the resolution before Congress and any other facts of general interest and send to the editor, being sure to tell the readers that free literature about Esperanto will be mailed upon application to THE ESPERANTO OFFICE, Washington, D. C., if name, address and stamp for reply are sent.

When you are subscribing or renewing your subscription to any of the various magazines of the country, as "Saturday Evening Post," "Everybody's," etc., be sure to send these subscriptions through THE ESPERANTO OFFICE. If you are subscribing for several, we can make you the best club prices, and the commissions will add a few dollars to the treasury, yet cost you nothing.

Because of the crowded condition of this number, due to the story of the Congress, the usual departments have been omitted, but the November number will contain the regular news, literary, beginner's and official departments.

Renew your subscription, renew your membership and do everything in your power to bring more members into the movement. THE SUCCESS OF THE MOVEMENT DEPENDS UPON THE INDIVIDUAL MEMBER.